

HUNGARA VIVO



1966

4

Szalay Sándor 4 enero 1967

Hungria

HUNGARA VIVO

Kvaronjara revuo de Hungara
Esperanto-Asocio

Budapest VIII., Kenyérmező utca 6.



1966. VI-a jaro 4-a n-ro

Sur la frontpaĝo:

Konstruigas la Fortikaĵo de la Kulturo sur loko
de la iama Reĝa Palaco de Buda

| | |
|---|-------|
| Ödön Kisházi: Saluto al la 51-a Kongreso | 1 |
| Ivo Lapenna: Festparolado dum la Inaŭguro | 2 |
| T. Ujlaky—Nagy: Longe vivos la memoro de nia 51a | 4 |
| B. Szerémi-Tóth: El la perloj de la 51-a UK | 8 |
| Hilda Dresen | 10 |
| Lőrinc Szabó | 11 |
| Lőrinc Szabó: Poemoj. Trad. K. Kalocsay kaj L. Tárkony | 12 |
| B. Szerémi-Tóth: Sur la maldekstra bordo de Danubo | 13 |
| Mozaiko el la vivo de Julio Baghy | 15 |
| El nia vivo kaj kulturo | 17,24 |
| S. Szathmári: Enciklopeditis | 18 |
| Tamás Bárány: Enhaveniĝo. Trad. L. Tárkony | 20 |
| David Bušs: La verkaro de Zamenhof | 21 |
| Tibor Barabás: La infanoj de Sarastro. Trad. P. Balkányi | 23 |
| Pál Királyhegyi: La mondfamo kaj mi. Trad. L. Kökény | 25 |
| János Arany: En senfrukta horo. Trad. L. Tárkony | 28 |
| S. Szathmári: Dante en la hungara arto.... | 28 |
| István Kamjén: Unu minuto. Trad. S. Szalay | 29 |
| Endre Simon: La ondoj. Trad. Sándor Polacsek | 30 |
| Korespondi deziras..... | 24 |
| Ágnes Lukács: La 10-a Infana Kongreseto | 26 |
| Magda Donászy: La grilo kaj la formiko. | 27 |
| Paŝo Ludas Matyi | 32 |

Disvastigas la Hungara Poŝto. Estas abonebla en la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (Budapest V., József nádor tér 1.) kaj en ĉiu poŝtoŝtanco. Jara abono 20 forintoj; por eksterlando 26 forintoj. Ĉeknumero ĉe individua abono 61.280. Nomo de la ĉekposedanto: „Központi Posta Hírlapiroda”.

Abono pagota en eksterlando: en la oficejoj por eksterlandaj libro- kaj gazetmendoj, troveblaj en preskaŭ ĉiuj ĉefurboj.

Ĉiujn leterojn pri abono kaj administracio bonvolu sendi al la Esperanto-Revuo, Hungara Vivo, Budapest, VIII., Kenyérmező u. 6.

Ĉefredaktoro: Ludoviko Kökény
Responda redaktoro: Borbala Szerémi-Tóth
Redakta Komitato:
Sz. Bálint, V. Benczik, I. Botos, L. Lesznai,
D-ro J. Mátéffy, D-ro K. Mezei,
A. Szabó, kaj T. Ujlaki-Nagy
Ĉefkunlaborantoj:
J. Baghy, P. Balkányi, K. Kalocsay
S. Szathmári kaj L. Tárkony
Artista ĉefkunlaboranto: Ágnes Lukács
Eldonas: „Népszava” Gazeteldona Entrepreno,
Budapest, VII., Rákóczi út 54.
Telefono: 224-819
Responda eldonisto: Márton Gábor direktoro
66.62894 Akadémiai Nyomda, Budapest
Responda gvidanto: György Bernát
Indexszám: 25377



Tombkapelo „Gül Baba”

Pacan kunlaboron, pacon, pacon, pacon kaj bonan sanon ni korege deziras al ĉiuj gesamideanoj — ĉu abonantoj de H.V. ĉu ne — okaze de la nova jaro 1967! Fortikiĝu la internacia kunlaboro, ĉesu ĉiuspeca agresado kaj atako, la Paco okupu sian indan lokon en ĉiuj landoj de la mondo. Anstataŭ milita atmosfero sekvu malmarmado, forĵeto de ĉiuj murdiloj! La homaro finfine vivadu sen murdoj, sen militoj!



**FREMDULTRAFIKA, NEGOCA, VOJAĜA
KAJ LIVERA AS**

Direkcio: Budapest V., Felszabadulás tér 5.

Telefono: 180-860

Telegramo: IBUSZDION Fondojaro: 1902

IBUSZ — kiu havas jam 63-jaran pasinton — hodiaŭ estas la plej granda fremdultrafika entrepreno en Hungarlando. Ĝi havas enlande plurajn oficejojn, kaj eksterlande estas en vigla negoca kontakto kun proksimume 300 vojaĝoficejoj. La agadsfero de IBUSZ estas tre multflanka. Pere de la vendo de vojaĝbiletoj, pere de eksterlandaj banknegocoj, hotela ĉambromendado, organizo de ekster- kaj enlandaj societvojaĝoj ĝi servas la fremdultrafikon, kaj prizorgas la taskojn kiuj rilatas la vojaĝon kaj ripozadon.

SALUTO AL LA 51-A KONGRESO

Ödön KISHÁZI Viceprezidanto de la Hungara Popolrespubliko,
Alta Protektanto de la Kongreso:



En la nomo de la Prezida Konsilantaro de la Hungara Popolrespubliko kaj en nomo de la Hungara Revolucia Laborist-Kampanara Registaro mi kore salutas ĉiujn partoprenantojn de la 51-a Universala Kongreso de Esperanto. La hungara registaro kun ĝojo sciiĝis, ke la gvidantaro de Universala Esperanto-Asocio akceptis la inviton de Hungara Esperanto-Asocio kaj kiel lokon de la 51-a Kongreso en 1966 elektis Budapeŝton.

La hungara registaro elkore bonvenigas en nia lando ĉiun eksterlandan civitanon, kiu venas en nian patrujon, por ekkoni nian popolon, ties kulturon, vivrimedojn, ke helpe de tiuj konoj, ankaŭ li plifortigu la amikecon inter la nacioj, la pacan kunvivadon.

La lastaj mondmilitoj rezultigis ruinaĵojn kaj nemezureblan homan suferon en nia patrujo. Post cikatrigo de la plej gravaj vundoj, nia popolo komencis sian landkonstruan laboron, kreis novan konstitucion por nia popolo. En la pasinta tempo forte evoluis la industrio, la agrikulturo kaj la kultura vivo en Hungarlando. Samtempe metiĝis en la centron de la vivo la homo mem kaj ties apreco laŭ lia diligenta laboro. En nia ŝtato la homo estas la plej granda valoro, ĉio okazas por lia intereso. La baza politiko de la registaro de Hungara Popolrespubliko estas la pacpolitiko kaj la sistema plialtigo de la vivstandardo de la popolo.

La celo de la Esperanto-movado estas, ke Esperanto estu — apud la naciaj lingvoj — la lingvo de internaciaj kontaktoj. Vi parolas ĉi tie unu komunan lingvon kaj mi sentas tiel, ke helpe de tiu lingvo komuna vi pli rapide komprenas, ekkonas kaj estimas unu la alian. Mi opinias, ke ĉiuj kiuj batalas por rekonigo de unu komuna internacia lingvo, samtempe batalas ankaŭ por reciproka estimo de la popoloj, por paca apudvivado de la diversaj sociaj sistemoj, por plifirmigo de la mondpaco.

En tio mi vidas la plej belan kaj grandan celon de la Esperantomovado. Kun ĝojo mi povas raporti al vi, ke en la pasinta tempo

ni atente observis la laboron de la prepara komitato, laŭeble ni donis helpon por ties intereso, ke la 51-a Universala Kongreso povu labori rezultoplene, por ke ĉiu kongresano sentu la estimon, gastamon de la hungaraj esperantistoj.

Sincere ni deziras, ke helpe de viaj rezultoj plialtiĝu la nombro de la esperantistaro, pligrandiĝu la tendaro de la honestaj homoj batalantaj por la paco, kiun ja ege ni bezonas en la hodiaŭa tre maltrankvila kaj danĝera situacio de la mondpolitiko.

Mi deziras, ke vi fartu bone en nia patrujo kaj mi esperas, ke hejmen irinte vi gardos en via memoro la estimon kaj amikecon al la hungara popolo. Dezirante denove sukcesplenan laboron al ĉiu partoprenanto de la Kongreso, mi deziras al ĉiuj karaj ĉeestantoj ĝojplenan vivon kaj tre bonan sanon. (Aplaŭdego. — La lastajn frazojn la Viceprezidanto diris en Esperanto.)



FESTPAROLADO DUM LA INAŬGURO

Prof. d-ro Ivo LAPENNA, prezidanto de UEA:



Prof. Ivo Lapenna diras sian festparoladon

El vidpunkto de internaciaj rilatoj specialan signifon havas la riveroj, kiuj fluas tra pluraj landoj. Ilin oni utiligis por fiksi limojn inter unu ŝtato kaj la alia, kelkfoje kun la celo malhelpi kontaktojn; ilian ekspluatadon oni reguligis per juraj preskriboj, ofte detalaj, komplikaj kaj ĝenaj: sporade, de tempo al tempo iliaj bordoj estis scenejoj de kruelaj bataloj kaj iliaj akvoj ruĝiĝis pro la homa sango... Sed eĉ en la kazoj, kiam diversaj artefaritaj baroj dumtempe malhelpis aŭ eĉ plene malebligis ilian naturan destinton, tiuj riveroj tamen plu konservis sian kunligan forton, kiu estis tiel potenca, ke ĝi ĉiam denove devige altrudis al la homoj politikajn jurajn solvojn, adekvatajn al la faktaj bezonoj kaj al la vivinteresoj de ĉiuj.

Danubo verŝajne pli multe ol kiu ajn alia en la mondo liveras multspecajn ekonomiajn riĉaĵojn, prezentas inspirajn naturbelajaĵojn, kaj ĝia historia tasko certe ne

estas disigi, sed kunligi kaj kontribui al la evoluo de amikaj rilatoj. Ĉiutage, ĉiumomente, jam dum jarmiloj, ĝi renaskiĝas en la Nigra Arbaro, traboras al si la vojon inter altaj montoj, pasas tra ebenaĵoj, impete venkas rokegojn kaj en pompa grandiozo atingas la Nigran Maron. Kvazaŭ timante troan ŝveliĝon, ĝi tra subteraj fendegoj donacas parton de siaj akvoj al Rejno, la alia koloso, kiu direktas sin al la okcidento kaj malaperas en Atlantiko. Tiamaniere de unu ekstremo de Eŭropo ĝis la alia, de okcidento ĝis oriento, la akvoj de Danubo daŭre kaj seninterrompe fluas, dum la rivero mem prezentiĝas kiel giganta akvo-arterio, kiu spitante la sociajn, lingvajn kaj aliajn apartaĵojn aŭ eĉ antagonismojn de la homoj, egale grandanime donas sin mem al la gentoj, triboj kaj poste nacioj, ekloĝintaj sur ĝiaj bordoj kaj en ĝiaj valoj.

Ĉe la bordoj de tiu riverego, prikantita de poetoj, eternigita en

skulptaĵoj, en verkoj de pentroarto kaj muziko, eĉ en mondkonata populara valso, etendiĝas Budapeŝto, urbo tiel ĉarma kaj bela, ke oni kutimis ĝin nomi „la reĝino de Danubo”, kaj kiu ankaŭ hodiaŭ, kiam ĝi grandparte releviĝis el la ruinoj de la milito, estas konsiderata „la perlo de Danubo”. (Aplaŭdo.)

Por la brava hungara popolo Budapeŝto estas ne nur tutsimpe la ĉefurbo de la Hungara Ŝtato, sed ĝi prezentas la politikan kaj kulturalan centron, ĉirkaŭ kiu dum jarcentoj disvolviĝis la eventoplena historio de Hungarlando, kaj en kiu estis kreitaj en diversaj periodoj, multaj rimarkindaj spiritaĵoj valoroj de monda formato. Malfeliĉe, granda nombro da literaturaj verkoj, veraĵoj plenparfumaj de arta beleco, elkreskintaj el la hungara grundo, restis nekonataj al la cetera mondo, ĉar la lingvo de tiu ĉi klera popolo kun vasta kaj admirinda kulturo kaj alta civilizo, ne estas parenca al tiuj de la najbaraj landoj kaj, ĝenerale, tre malmulte scianta en la mondo. Tio, interalie, kaŭzis ke la Hungaroj ĉiam devis, kaj grandparte plue devas, laŭeble komunikadi kun alilandanoj en fremdaj naciaj lingvoj, plej ofte same fremdaj ankaŭ por tiuj, kun kiuj ili rilatas, precipe se temas pri la najbaraj landoj.

La Internacia Lingvo jam antaŭ tre longe komencis disvastiĝi en Hungario, tiel ke en 1929 povis okazi nia 21-a Universala Kongreso en tiu ĉi sama urbo. Ĝi estis mia unua Universala Kongreso kaj ĝi donis al mi la okazon uzi la lingvon por la unua fojo en konversacio kun alilandanoj. Ĝi estas unu el la neforgeseblaj travivaĵoj de mia junaĝo, kiu multilate difinis mian tutan postan vivovoĵon, ne nur sur la kampo de Esperanto. Tiu Kongreso transformis min el hezitema komencanto, dubanta — verŝajne sub la influo de ĉiaspecaj antaŭjuĝoj —

pri la ebleco mem de neŭtrala homa lingvo, en konvinkitan laboranton por tiu mirinda instrumento de internacia komunikado. (Aplaŭdo.) Ĝis hodiaŭ mi vivece rememoras, kiel ravita mi estis pri la funkciado de Esperanto en internacia medio, kaj entuziasmigita pri la alta nivelo de poluriteco kaj sona beleco de la lingvo, kiam ĝi estis parolata de tiuj, kiuj plene ekmastris ĝin kaj tial povis majstri en ĝi. (Aplaŭdego.)

Tiam la unuan fojon mi ankaŭ aŭdis du nomojn, kiuj por mi, same kiel por multaj, tre multaj aliaj, en la postaj jaroj iĝis nedisigeble ligitaj al Esperanto: Julio Baghy kaj Kolomano Kalocsay. (Aplaŭdego.)

Dank' al tiuj du kolosoj kaj al la skolo, kiun ili fondis kune kun pluraj aliaj verkistoj, Budapeŝto ricevis plian signifon, ne plu sole por la hungaroj, sed por la mondo, ĉar ĝi fariĝis por la Internacia Lingvo kaj por ĉiuj ĝiaj uzantoj tio, kio estis siatempe Firenze por la itala. Eluzante ĉiujn internajn eblecojn, kiujn enhavis la genia verko de Zamenhof, ili sukcesis per siaj multnombraj majstraj literaturaĵoj, ĉu originalaj, ĉu tradukaj, per la kunredaktado de „Literatura Mondo” dum la tri periodoj de ĝia aperado, per kunlaborado en aliaj literaturaj revuoj, levi la lingvon al pli alta ŝtupo de nuancita arta esprimilo, kontentiganta eĉ la plej severajn postulojn de plensuka prozo kaj de la sublimaj suproj de poezio. (Aplaŭdo.) Naskitaj en la sama jaro, ili akiris Esperanton preskaŭ samtempe. Ekde tiam, kaj precipe de post la finiĝo de la unua mondmilito, ili senĉese estis aktivaj sur la literatura kampo. Iliaj plej lastaj verkoj aperis nur antaŭ nelonge: la originala romantika poemo de Baghy „Songe sub pomarbo”, kaj la granda tragedio de Shakespeare „Reĝo Lear” en la supermajstra traduko de Kalocsay en tiu ĉi jaro. En tiu ĉi momento, dum la inaŭgura solenaĵo mem la Kongreso, kiu okazas en la urbo de maturiĝo de Esperanto kiel literatura lingvo, mi nur deziras en via nomo, en la nomo de UEA kaj en la

nomo de la tuta Esperantomovado esprimi tutkoran dankon al Baghy kaj Kalocsay pro ilia giganta kontribuo al la Esperantlingva kulturo. (Aplaŭdo.) Ili nun troviĝas inter ni kiel niaj Honoraj Kongresanoj kaj mi petas ilin akcepti en la nomo de Universala Esperanto-Asocio tiujn ĉi memoraĵojn kiel pli ol modestajn signojn de la senfinaj respektoj kaj admiro, kiujn ni havas por ili: iliajn lastajn verkojn lukse kaj arte binditajn. Por Julio Baghy „Songe sub pomarbo”, por Kolomano Kalocsay „Reĝo Lear” (Longaj aplaŭdoj, dum prof. Lapenna transdonis la donacojn al la du aŭtoroj).

La karakteron de nia 51-a U. K. markas la rezultoj atingitaj en la granda nova agado de UEA okaze de la Jaro de Internacia Kunlaboro. Kiel konate, la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj jam en la jaro 1963 decidis celebri la 20-jaran datrevenon de fondiĝo de Unuiĝintaj Nacioj per intensigo de internacia kunlaborado en ĉiuj sferoj. La celo de la Jaro de la Internacia Kunlaboro estis mildigi kontraŭaĵojn, malstreĉi tensiojn kaj tiel kontribui al monda paco.

Kun granda plezuro mi povas informi vin, ke tiu speciala laborplano de UEA estas plenumita kaj ke, rezulte de la agado de UEA — nome de ĝiaj centraj organoj, de la landaj asocioj, fakaj organizaĵoj, lokaj grupoj kaj individuaj membroj en 85 landoj — almenaŭ 50 milionoj da personoj estis en tiu aŭ alia formo sciigitaj pri la JIK. Mi kuraĝas aserti, ke tiuj atingoj superas la rezultojn, kiujn povis prezenti al Unuiĝintaj Nacioj ĉiuj aliaj neregistaraj organizaĵoj kune. Per tiu sia rimarkinda kontribuo al la celoj de la JIK la E-movado, organizita en la politike neŭtrala UEA ankoraŭ foje manifestis sian firman apogon al ĉiuj sinceraj klopodoj dispeli internaciajn tensiojn kaj sian fidon je la idealoj de interpopola interkompreniĝo, internacia kunlaborado kaj monda paco.

Inter la aliaj agadoj entreprenitaj en 1965, UEA iniciatis ankaŭ kolektadon de subskriboj

je propono, ke Unuiĝintaj Nacioj solvu la lingvan problemon per efika helpo al disvastigo de la neŭtrala Internacia Lingvo Esperanto, rekomendante ankaŭ al la ŝtato-membroj progresigi ĝian instruadon kaj stimuli ĝian uzon en la internaciaj rilatoj de la popoloj. En mallonga tempo de iom pli ol unu jaro la proponon subskribis, laŭ la nombrado ĝis nun farita en la Centra Oficejo de UEA, entute 900 mil individuaj personoj (Aplaŭdo); inter kiuj unu ŝtatestro, la prezidanto de Aŭstrio S-ro Franz Jonas (Aplaŭdego), multaj membroj de registaroj kaj parlamentanoj; lingvistoj kaj filologoj; Nobel-premiitoj, membroj de sciencaj akademioj, institutoj kaj profesoroj, verkistoj, artistoj, ĵurnalistoj, instruistoj, kamparanoj kaj laboristoj — kiuj ja ankaŭ, eble eĉ pli ol ĉiuj aliaj bezonas la Internacian Lingvon (Aplaŭdego.) — kaj personoj apartenantaj al aliaj profesioj. Krome, la proponon subskribis — kaj tion mi aparte akcentas — pli ol 3700 organizaĵoj kun pli ol 73 milionoj da membroj. (Aplaŭdego.)

Kio estas la senco de tiu propono? — En la nuna epoko de giganta teknika progreso kaj interdependeco de la mondo, la internaciaj kontaktoj ĉesis esti privilegio de malmultaj kaj fariĝis rajto de amasoj. La lingvodiverso transformiĝis el ĝeno por kelkaj en mondan problemon por ĉiuj. En tiaj kondiĉoj la lingvaj baroj prezentiĝas kiel ĉefa obstaklo al adekvata internacia komunikado sur ĉiuj kampoj inkluzive de la personaj rilatoj de ordinaraj homoj, kio siavice malhelpas aŭ eĉ malebligas la utiligon de la sciencaj atingoj, la ampleksigon de la kulturaj interesanĝoj kaj la internacian kompreniĝon. (Aplaŭdo.) La lernado de fremdaj naciaj lingvoj, malgraŭ la grandaj fortostreĉoj kaj financaj rimedoj dediĉitaj al tiu celo, donis mizerajn rezultojn, kutime ne la pasivan lingvoscion. La tielnomataj oficialaj kaj laboraj lingvoj en diversaj internaciaj registaraj kaj neregistaraj organizaĵoj ne nur ne solvis kaj ne solvas la demandon eĉ por la limigitaj bezonoj de tiuj

organizaĵoj, sed ĝi kontraŭas la principon de egaleco de ĉiuj nacioj — grandaj kaj malgrandaj — kaj efektive prezentiĝas kiel formo de grava diskriminacio: la lingva diskriminacio. (Aplaŭdo.) Oni hodiaŭ multe parolas pri diskriminacio: rasa, nacia kaj alispeca. Kaj tio estas bona. Kompreneble, ni ĉiuj estas kontraŭ la nacia aŭ kontraŭ iu ajn alia formo de diskriminacio (Aplaŭdo.), sed ni estas ankaŭ kontraŭ formo de diskriminacio, pri kiu oni ne parolas, aŭ intence ne volas paroli, kaj kiu tamen estas gravega: la lingva diskriminacio. (Aplaŭdego.)

La adopto de la Internacia Lingvo konforme al la propono respondas al la bezonoj de la moderna homo en la kosma aero kaj prezentas la sole ĝustan kaj racian solvon de la nuntempa

lingva problemo el ĉiuj vidpunktoj: pure teknike lingva, psikologia, socia, ekonomia kaj politika. La definitiva solvo de la lingvo-problemo estos unu el la plej signifaj pozitivaj eventoj en la tuta kultura historio de la homaro kaj malfermos novajn perspektivojn por multe pli vasta kaj pli profunda interpopola kunlaborado sur ĉiuj kampoj: internacia kompreniĝo, vera progreso kaj paco (Aplaŭdo.). Ne malutilante al iu ajn ĝi prezentas nur avantaĝojn por ĉiuj.

En la komenco mi diris kelkajn vortojn pri Danubo. Permesu al mi en la fino denove menciigi ĝin kaj fari komparon.

Se ĝiaj akvoj estus limigitaj nur al la kvanto ricevita ĉe la fonto, ĝi estus sensignifa, ne konata rivereto, kiu verŝajne malaperus ie subtere, en iu lageto aŭ marĉo,

aŭ eĉ sekiĝus dum sia fluado. Ĝi fariĝas ĉiam pli forta, ĉiam pli potenca, por fine atingi gigantajn dimensiojn, ĉar ĝin nutras centoj da aliaj riveroj kaj riveretoj.

Tiel same alfluu al nia komuna Universala Esperanto-Asocio el ĉiuj flankoj, de dekstre kaj maldekstre, de oriento kaj okcidento, de nordo kaj sudo, ĉiuj pozitivaj fortoj kaj fortetoj, kaj ni ŝtopu ĉiujn breĉojn por ne perdi eĉ unu el ili, ĉar nur tiel ĝi povos fariĝi tiel potenca, ke ĝi sukcesos frakasi la lastajn rokegojn de antaŭjuĝoj, superstiĉoj kaj kontraŭstaroj, kaj povos konduki la Internacian Lingvon en majesta pompo, same kiel Danubo faras post la venko de Gerdap, al la fina celo — la generaliĝo de la Lingvo Internacia por ĉiuj internaciaj rilatoj en la intereso de ĉiuj.

(Aplaŭdo.)

LONGE VIVOS LA MEMORO DE NIA 51^A

La solenaj tonoj de la festoferma himno jam forsonis longe, la pli ol kvarmil membroj de la unusemajna giganta amika rondo estas jam alhejmiĝintaj, kaj la 51a enmarŝis brila en la historion de Esperanto, por stari tie kiel unua mejloŝtono de nova vojetapo kondukanta preter la vico de dua kvindeko da gloraj kongresoj.

Nun, kiam en relative pli trankvila tempo postkongresa, post tagoj plenaj de gravaj okazaĵoj kaj miloj da etaj, kortuŝaj travivaĵoj, korvarmigaj momentoj, sed ankaŭ de bruoj, ekscito, svarmado kaj — nemalofte — ĉagrenoj kaj malagrablaĵoj, ni prenas la plumon por fari raporton al niaj karaj legantoj, ni petas vin ne atendi de ni regulan listigon pri ĉiuj eroj de la kongreso. Tiun faris ja la Kongresa Bulteno kaj baze de ĝi aliaj, unuavice informaj gazetoj.

Sabate, antaŭ la oficiala malfermo okazis laŭprograme la inaŭguro de la 10a Internacia Infana Kongreseto de 88 infanoj el 15 landoj kaj la renkontiĝo de la pedagogoj kun partopreno de pli ol 200 instruistoj.

Ĝis vespero ankaŭ la plej lastaj preparlaboroj estis faritaj, por ke la preskaŭ kompleta kongresanaro povu renkontiĝi kaj amuziĝi en gaja, amika atmosfero en la granda salonego Petőfi sur la teritorio de la Budapeŝtaj Internaciaj Foiroj.

Post tiu tradicia antaŭludo sekvis dimanĉon antaŭtagmeze la sendube plej impona aranĝaĵo de la tuta kongreso, la Solena Inaŭguro. Ĉu necesas pli elokventa demonstro pri la taŭgeco kaj vivindeco de la Internacia Lingvo ol kvarmil personoj el pli ol 40 landoj, kiuj sidas sen surkapaj aŭskultiloj, kaj senĝene komprenas diversnaciajn parolantojn, ... escepte nature la hungarajn gastojn, la reprezentantojn de la kongreslando, kies hungarajn vortojn tradukisto esperantigis. La paroladon de nia alta patrono, Ŭdön Kisházi vi trovas sur la unua paĝo de tiu ĉi numero. En la nomo de la gastiganta hungara metropolo d-ro István Sarló, la ĉefurbestro de Budapeŝto salutis la kongresanojn. „Vi havos okazon ne nur labori — li diris interalie — sed ankaŭ konatiĝi kun nia urbo, la ĉefurbo de la paco kaj amikeco. La forto de ĉi tiu urbo estas en tio, ke en ĝi loĝas du milionoj da homoj laborantaj, celantaj al progreso. Ni scias, ke ankaŭ la esperantistoj troviĝas en la unuaj vicoj de la batalantoj por la progreso. Tial mi esprimas la deziron, ke la Esperantomovado fortikiĝu kaj Esperanto estu akceptita kiel oficiala lingvo.”

Parolado paroladon sekvis poste, laŭ la multjara tradicio de la Malfermaj Solenaĵoj. El ili ne mankis la same tradicia mallonga salutparolo de

Julio Baghy (kiel reprezentanto de HEA) dankita per longa, entuziasma aplaŭdo.

Kiel freŝa venteto alportanta la parfuman odoron de kampaj floroj, bunta girlando el ĉarmaj infanoj man-en-mane kroĉantaj unuj la aliajn, gaje eruptis en la salonegon kaj devigis paŭzi la ŝajne nehaltigeblan parolkaskadon. Kantante ili preterserpentumis la estraran podion tukojn kaj bukedojn flirtante: la 10a Infana Kongreseto salutis la 51an de la plenkreskuloj.

Estis bone, ke la leĝera infankanto kaj poste distra muziko refreŝigis la cerbojn lacajn pro la multa parolo. La zenita punkto de la Inaŭguro, la festparolado de d-ro Ivo Lapenna bezonis freŝan kapon, por povi ĝui en ĉiuj ĝiaj nuancoj la majstre kunmetitan paroladon, kaj inde aprezi la oratoran arton de nia parolvirtuozo.

Entuziasma pro la bela inaŭguro kaj iom malseka pro la eksterprograma pluveto, la publiko disiris, por kolekti forton en restoracioj aŭ bufedoj al la plua kongresado.

Posttagmeze disvolviĝis la unuopaj programeroj laŭ la kongreslibro en la kongresejo aŭ apartaj lokoj por apartaj fakoj. Mi menciigu la pedagogan kunvenon, la katolikan kaj luteranan diservojn, la inaŭguron de la Internacia Somera Universitato kaj la 35an



D-ro István Sarlós, ĉefurbestro de Budapeŝto salutas la Kongreson

de la dramo de la angla verkistino kaj poetino, Marjorie Boulton, verkita originale en Esperanto kaj temanta pri la rekomenco de la homa vivo sur la tero post tutmonda atommilito.

Vespere ekbrulis denove la gaslumineskaj lumtuboj sur la plafono de la salonego Petőfi, pleniĝis denove la granda inaŭgurejo, kaj baldaŭ ekparolis du aliaj lingvoj internaciaj, rivalante kun Esperanto, nome la muziko kaj la danco. Ankaŭ en tiu studobjekto faris bonan ekzamenon la gaja kongresanaro, kaj mi eĉ ne kuraĝus aldoni, ke „precipe la junuloj”, ĉar tio ne estus justa kontraŭ la ceteraj — ni diru — „ne tiom junaj”. Ne nur unu griza hararo brilis en la longaj serpentovicoj de la plej moderna 'let kiss'-danco. Kaj espereble neniu akuzos min pri ŝovinismo, se mi konstatas, ke la fajra hungara 'ĉardaŝ' havis ĝeneralan sukceson. Ke en la fruaŭroraj horoj, dum la nokta paŭzo de la trafikiloj, kiel sukcesis hejmeniri la ĉ. dumilopa ĉeestantaro, pri tio silentu mia kroniko, ĉar ankaŭ mi, pra-Budapeŝtano vagadis tutajn du horojn ĝis alveni hejmen. Sed tiu ĵetu la unuan ŝtonon, en kies hejmurbo estas pli bona la nokta trafiko.

Merkredo estis tago plenplena de altnivelaj prelegoj kaj prezentadoj aŭ aliaj similaj okazaĵoj. Nur kiel plej elstarajn mi menciis la Oficialan Akcepton en la parlamentejo. La vicprezidanto de la Hungara Popolrespubliko, s-ro Ödön Kisházi salutis la invititajn gastojn kaj la gvidantaron de UEA, responde al kio d-ro Ivo Lapenna dankis al la vicprezidanto kaj al ĉiuj hungaraj aŭtoritatoj pro la granda helpo donita al la kongreso.

La saman tagon okazis la proklamo de la premioj de la Belarta Konkurso. Ĝi alportis konsiderindan sukceson por ni hungaroj, ĉar krom unu laŭdan mension en la tradukita poezio al Julio

Blindulan Kongreson, kiel la plej vizitatajn.

Konstanta, senĉesa svarmado regis en la tuta kongresejo. Homoj svarmis tra la enirejo, homoj svarmis en la koridoroj, homoj svarmis en la salonoj Zamenhof, Privat, Canuto, Sebert... kaj Pompilio. Pli ĝuste en lia antaŭĉambro, kiun pleniĝis bela nombro da plendantoj, starantaj trankvile aŭ ekscitite en la vico por paŝi en la kontoron de KKS.

La kunsido de la juristoj, arkitektoj, studentoj, pedagogoj, medicinistoj kaj turistoj, la „Japanaj prezentadoj”, la „Hungara posttagmezo”, la ĝeneralaj kunvenoj de UEA kaj MEM estis la plej elstaraj programeroj de la lunda tagordo, kaj poste vespere... nu jes, al tio mi dediĉu kelkajn apartajn vortojn.

Tri juvelŝtonoj diversgrandaj, diverskoloraj, sed tamen valoraj juvelŝtonoj ĉiuj tri, prezentataj en ega, sed belega skatolo nomata teatro Madách, — jen konciza opinio pri la prezentado de la Internacia Teatro. La ludadon de la malgranda ensemblo sub la direktorado de s-ano Flego mi vicigas inter la plej elstarajn, plej altvalorajn travivaĵojn de la tuta kongresa programo. Mia ĝuo estis triobla: la lingva perfekteco, poste la belsoneco de la tekstoelparolo kaj el prononca kaj el aktora vidpunktoj, kaj fine la perfekta ludo, kiu manifestiĝis tiel en la leĝera, petolema konduto de la du gejunuloj, kiel en la lerta senvoĉa gestado, kiu fidele sekvis ĉiun turnon de la sonbendo-perita drama vortuelo inter la juna kaj maljuna memo de la politikisto, aŭ en la komikeco kaj ĉarmo de la muzika komedioto. Sendube tiu lasta, la originala verko de Julio Baghy, „La holanda pupo”, kun la muziko de Miĥaelo Sárosy,

gajnis la plejan plaĉon de la publiko, kio estas komprenebla, ĉar ja la farsa bonhumoro, la muziko kaj la ĉarma virino, tiuj tri elementoj eĉ en nia epoko ne perdis sian allogan forton kaj raven. Kun sincera entuziasmo aplaudis la dankema publiko kaj al la eminentaj geaktoroj de la tri teatropecoj kaj al la ĉeestanta verkinto de la tria teatraĵo. Koran gratulon al ili ĉiuj!

La marda programo inkluzivis same la laŭplanajn programerojn, el kiuj altiris plej grandan nombron da ĉeestantoj la Virina Kunveno kaj la neforgesebla, animskua teatraĵo „Ĉu esti aŭ ne esti”, pradebuta prezentado



Parto de la kongresanoj en la Inaŭgura Festo



Parto de la Prezidantaro. Maldekstre la unua f-ino Vermaas, d-ro István Sarlós, ĉefurbestro de Budapeŝto, d-ro István Nagy, ĉefredaktoro de Hungara Esperantisto, Günther Becker, ĝenerala sekretario de UEA



Impona pedagoga kunveno. En la unua vico Julio Baghy, la unua s-ino Emilia Radvánszky, la dua Béláné Legény, la tria Mária Kenesei; malantaŭ Baghy kun okulvitroj Paŭlo Balkányi, ĉefkunlaboranto de Hungara Vivo.



Károly Rödönyi (maldekstre), ĝeneraldirektoro de la Hungaraj Fervojoj, d-ro István Bácskai, vicprez. de HEA, Béla Bercei, prez. de LKK vizitas la grandan E-ekspozicion (kies ĉefa aranĝanto estis la ĵurnalisti Imre Szenes) en la palaco de la Minista Sindikato



La Bankedo en Gundel. Du amikinoj: maldekstre Petkova Trajana, dekstre Margareta Batta



Louis Obreczián, usona hungaro, pens. ministro, dancas kun sia parenĉino



La Oficiala Balo. La danco „let kiss”



Béla Bercefi, Ivo Lapenna, Glauco Pompilio



La du rolantoj de la dramo Katakai

Varga kaj unu trian premion en la originala prozo al Andreo Szabó ankaŭ la premiojn por „Nova talento” kaj „Aŭtoro de la jaro” ricevis la hungaraj Vilmos Benczik, resp. Lajos Tárkony.

La kunvenoj de la sciencistoj, aŭtomobilistoj, katolikoj, protestantoj, filologoj, pupteatro-artistoj kaj la Oratora Konkurso estis kromaj pli elstaraj programeroj de la tago.

Vespere en la plej granda ĉambrego de la kongresejo mi havis la ĝojon spekti la teatraĵon „Katakai-Malamiko”. La du polaj aktoroj kun laŭdinda arta kapablo prezentis la streĉan dramatan situacion inter du malamikaj soldatoj — japano kaj usonano — sur senhoma insulo, ilian iom-post-ioman interamikigon spite la mankon de komuna lingvo, kaj la tragikan finon pro la fanatika sinmortigo de la japana soldato.

Estis bone farite, ke la pleja parto de la kongresaj deĵoroj jam paŭzis en la vesperaj horoj, kaj la deĵoranto, kiu estas samtempe aboninta kongresano, fine povas partopreni unu eron de la tuttaga programo, nome la teatron. Ĉu vi jam pensis pri tio, Kara Leganto, kiel malfacile estas por la personaro de la kongres-aranĝantaro, kiuj estas same esperantistoj plenaj de arda deziro partopreni se eble ĉiujn interesajn programpunktojn, aŭ renkonti, akompani fremdlandajn amikojn, sed anstataŭ tio ili devas plenumi la entreprenitan deĵoron, diversajn servojn, laborojn, sen kontentigi siajn dezirojn. Ĉu mirinde, ke mankis necesa nombro da deĵorantoj, kaj ankaŭ inter la disponeblaj la disciplino ne staris sur stabilaj fundamentoj? Sed bedaŭrinde, solvo ne ekzistas. Aranĝi, organizi, priservi Esperanto-kongreson kapablas ja nur esperantistoj! Ĉe aliaj ne-esperantistaj aranĝaĵoj tiu problemo ne estas konata. Tie la teknikan parton de la aranĝaĵo faras tute aparta

personaro, kaj la fakuloj, la sciencistoj ktp. nur kongresas. En niaj kongresoj ĉion devas fari ni mem. Nur pro kuriozeco mi listigas ĉi-sube miajn ĉefajn kontribuojn: mi ŝarĝportis pezajn staplojn de Hungara Vivo por la „dokumentujoj”, plenigis dokumentujojn dum tri tagoj, zorgis pri surskriboj en kaj ĉirkaŭ la inaŭgurejo, deĵoris en la Gazetara Servo, interpretis ĉe intervjuo de ĵurnalisto kun d-ro Lapenna, tradukis tri paĝojn da fakteksto por preleganto en la kunsido de teknikistoj, interpretis ĉe radio-intervjuo kun poetino Marjorie Boulton, akceptis gastojn ĉe la Oficiala Bankedo, dungis kaj pagis la servistinojn de la salonego Petőfi, kolektis abonojn por Hungara Vivo kaj vendis fervojbiletojn por la ekskurso al la Esperanto-fonto.

Ĵaŭdo estas la tradicia ekskursita tago. Granda parto de la anaro partoprenis po unu el la kvar organizitaj ekskursoj. La ŝipvojaĝo kondukis 600 kongresanojn al la praa primata urbo Esztergom. 5 aŭtobusoj veturigis 220 personojn laŭ la vojaĝdirekto urbo Kecskemét, vilaĝo Solt, urbo Dunaújváros. Vagonaro portis 300 personojn al urbo Miskolc kaj de tie al la fama stalagmita groto Aggtelek, kie 65 membra muzikorkestro kaŝita post la stalaktito-kolonoj ludis por distri la alvenintojn. Spektaklo fabela, travivaĝo ne-ĉiutaga! — Fine 7 aŭtobusoj da pasaĝeroj vizitis Balatonon kaj gaje banis sin en la „hungara maro”. La faksperta, multlabora organizado kaj bone oleumita disvolvo de la ekskursoj estas la nekontestebla merito de nia senlaca samideano, Szilárd Bálint kaj de lia helpantaro. Ili rajte meritas la rekonon kaj dankon de ĉiuj partoprenintoj. — Al tiuj, kiuj ne ekskursis, la satira unuaktaĵo de Sándor Szathmári kun la titolo „Budapeŝta ekzameno” estis prezentita de lertaj rolantoj.

La rutinan tagordon de vendredo fermis malfru-posttagmeze la inaŭguro de la Esperanto-parko situanta piede de la monto Gellért, en tuja proksimeco de la novkonstruita ponto Elizabeta.

La vespero havigis neforgeseblan ĝuon al pli ol 3000 kongresanoj. En la programo de la Hungara Vespere la gastoj povis aŭdi virtuozan ciganzmuzikon kaj vidi buntajn kostumajn popoldancojn kaj hungarajn kaj ciganzajn. La iom malproportie troa kvanto da ciganzaj scenoj malfavore al tiuj hungaraj eble kredigis al multaj spektantoj la pli altan evoluointecon de la cigana folkloro fronte al la hungara. Aliaj eventuale identigis la du tute malsamajn folklorojn (kiel faris antaŭ nelonge iu Esperanto-gazeto, prezentante foton pri ciganz dancosceno kun la surskribo: hungara popoldanco). Kompreneble tio ne estas vera, tamen mi devas rekoni, ke dum la prezentado la ciganzaj scenoj estis multe pli valoraj el dancarta vidpunkto. La entuziasma aplaŭdo post ĉiu ero pruvis, ke la prezentado atingis sian celon, la spektaklo gajnis la plaĉon kaj aprezon de la internacia publiko.

La sekvan matenon alvenis sabato, kaj kun ĝi la Solena Fermo de la kongreso kun la kutimaj paroladoj, laŭdaj kaj adiaŭaj vortoj, flagotransdono kaj ĝisrevido-diro al la sekvonta kongresurbo Tel-Avivo. Ni brave finkantis la tri strofojn de la Himno Esperanta, kaj kun malĝoja koro komencis la adiaŭadon. Malrapide, preskaŭ nevole disigis la amaso en la forta pluvo: jen, eĉ la ĉielo verŝis siajn adiaŭ-larmojn — sufiĉe abunde. — La salonego malpleniĝis, la 5a nerevokeble forpasis. Sed ĝia memoro longe vivos en la koro de kvarmil gesamideanoj.

Tibor Ujlaky—Nagy

Perloj de la aranĝaĵoj de la 51a Kongreso

Tejo Kongreso en Pécs

La enkonduka aranĝaĵo de la kongresaj tagoj estis la Internacia Junulara Kongreso.

La 23-an de julio, dum la tuta tago la pluvo torentis. La pesimistoj jam vidis la fiaskon de la kongreso pro la reen-turniĝo de la gejunularo. Misa supozo! Ili venis grupe kaj bonhumore, senĉese, en la akceptejon, kiel malsekiĝintaj birdetoj. Tamen vespere milope aperis la gefiloj de kvin kontinentoj ĉe la Konatiĝa Vespero freŝe, elegante, kaj gaje en la moderna restoracio Olimpia kaj — ĉiu manĝis duoble kaj dancis nelacigeble ĝis noktmezo. Ili sinkondutis modeste kaj korekte.

Je sunbrila mateno vekiĝis la gastoj kaj la loĝantaro. Pro la kareso de milda venteto flirtis salute la diversaj naciaj standardoj donante specialan solenan aspekton al la urbo.

En la subĉiela teatro okazis la solena inaŭguro, al kiu donis majestatan fonon la Baziliko kun siaj kvar, alten leviĝantaj turoj.

Levis la efikon tiu nekutima, efektiva „vivanta bildo”, ke el la pitoreska ĉirkaŭaĵo tra la stratoj la gejunuloj preskaŭ paradmarŝe sin direktis al la inaŭgurejo. Jen de tie,

jen de alie sonis ofte salutkrioj, renkontante alian grupon aŭ opajn personojn.

Tiu fakto, ke mil diverslingvaj gejunuloj povas kompreni unu la alian per unu sola lingvo sen interpretistoj, — konkrete kaj konvinke pruvis al la dubantaj reprezentantoj de la Urba Konsilantaro, Junulara — kaj Sindikata Organizo, ke Esperanto estas uzebla, eĉ bezonata internacia lingvo. Ankaŭ tion esprimis en sia malferma parolo la prezidanto de Landa Komunista Junulara Federacio.

La salutparoloj restos historiaj dokumentoj en la Arĥivo de TEJO.

Restas bela, neforgesebla memoraĵo por la loĝantaro de la urbo la lampiona pactedemonstracio, kiel lasta punkto de la inaŭgura programo. Tra la urbo marŝis la esperantista junularo kantante sur la ĉefa placo kaj ili haltis inter la iama turka minareto kaj la rajd-statuo de la fama, iama hungara — la turkan armeon venkanta militestro, JÁNOS HUNYADI (Hunjadi). Tie oni deklamis, kantis, kelkaj oratoroj parolis akre kontraŭ la vjetnama milito, entuziasme por la paco, por la unueco de la Mondjunularo, por la defendo de la Mondpaco.

La fenestroj de la domoj estis lumigitaj. La urba junularo kaj la lo-



MEM-kunsido. Apud la oratoro sidas la ĉefsekretario s-ro Balague

ĝantaro dense ringumis la kongresanojn. Ili estis la atestantoj profunde kortuŝitaj pro la unulingva, sed milkora Pactedemonstracio.

Infana paradizo

Neembarasate de la metropola bruo, ekster ĝi, inter montetoj konstruigis la Urba Konsilantaro por infanoj orfaj konstantan restadejon. Dum somero ili estas transloĝigitaj al la lago Balaton, pro tio estis transdonebla la tuta instituto al la Infankongreseto.

En granda ĝardeno staras la moderna, por infanoj establita konstruaĵo riĉe ĉirkaŭata de vegetaĵoj; arboj, arbedoj kaj arbustoj. Iom pli malproksime de ĝi estas familiaj vilaoj, kiuj ŝajnas esti ornamaĵo de unu el la plej multsignifaj institucioj.

En ĉi tiu mirinda ĉirkaŭaĵo, pro vivoĝojo kvazaŭ ebrie, konstante trilas la merloj, kveradas la palumoj, la turdoj senĉese ripetas la tamen neunutonajn fajfadojn, inter kiujn miksiĝas la sinanonca kriadado de kukoloj.

Okaze de proksimiĝo de la promenanto aŭ vizitanto de la Instituto, paŝo post paŝon pli akre estas rimarkeble, ke inter la birdovoĉojn miksiĝas iaj similaj, ĉarmaj sonoj, — ridoj kaj krioj de infanoj.

Enpaŝante la ĝardenon, spirretene mi haltis. Antaŭ mi staris viva bildo. Diversaj, — de la 4a ĝis la 14a jaroj geknaboj, blondaj, brunaj kaj nigraj, ludis kune — laŭ generacio —, kuradis, kriadis samlingve; — per Esperanto. Inter ili estis, kiujn oni lulis en Usono, aliaj vidis la leviĝantan Sunon en Japanujo. Jen, la infanoj de Sudo, brunigitaj de la balkana aŭ itala suno. Jen, tiuj venis el Nordo. Ilia haŭto pli blankas apud la bulgaraj infanoj. Sed ĉi tiuj fulgo-nigre hararaj japanaj knabinoj certe estas



En la unua vico maldekstre Toczisky, Andor Kelemen, Sándor Bán

ĝemeloj. Kvankam ŝajnas, ke la okuloj de la unua ne estas migdalo-formaj. Fakte, poste mi eksciis, ke ŝi estas hungara, budapeŝta knabineto... Kaj kiel bone ili komprenis unu la alian!

Mi staris tie kaj mi observis la tute sindonan ludadon de la preskaŭ cent geknaboj, kaj eĥis en mia koro kaj cerbo la kontraŭdiro al Dante: — Plenaĝuloj, kiuj enpaŝas ĉi tien, konsoliĝu, firmiĝu en la konvinkiĝo, ke niaj infanoj kaj nepoj atingos la feliĉan, senmilitan epokon, ĉar ni, la gepatroj, geavoj, ne ĉesas penadi, senlace labori por tio. Ni kreas por ili la Paradizon jam ĉi tie, sur la Tero!

MEM

SOFIO, ... TOKIO, ... BUDAPEŝTO, ... Jen, tri gravaj haltejoj en la Pacmovado de la esperantistaro. Evidentiĝis, ke ankaŭ en Budapeŝto estas malgranda la ejo por MEM Konferenco malgraŭ tio, ke dum la sama tempo estis enprogramitaj dekdu aliaj, diversaj aranĝaĵoj, kiuj altiris la interesigantojn. Tio substrekas la gravecon de MEM en la Esperanto-Movado, — kaj tion, ke la amaso de geesperantistoj ne estas neŭtralaj en la p a c o-problemo.

Inter la ricevitaj salutleteroj de diverslandaj MEM-sekcioj, plej multsignifa estas la letero de la KELI-Konferenco el Debrecen, subskribite de la prezidanto, sekretariino de KELI kaj du aranĝaj komitatanoj de KELI-Konferenco. KELI estas la unua Esperanto-organizaĵo, kiu publike kaj malkaŝe proponis helpon kaj subtenon al MEM. Jen citaĵo el la letero:

„... Bedaŭrinde ni devas konstati, ke multaj aferoj en ĉi tiu mondo

ne konformas al la volo de Dio. Multaj homoj en la tuta mondo suferas pro malsato, milito, rasa diskriminacio aŭ diversspecaj perfortaj agoj de la homoj. Kiel kristanoj kaj esperantistoj, ni en niaj koroj kun-suferas kun niaj proksimuloj, kie ajn ili troviĝas en cirkonstancoj ne homdignaj. Pro tio ni forte kondamnas ĉiujn perfortaĵojn kaj teruraĵojn, faritajn el naciismaj, ekspluatemaj kaj egoismaj motivoj. Kiel ekzemplojn ni mencias la subpremon de la neblankuloj en Suda Afriko kaj en Norda Ameriko, la ŝokajn cirkonstancojn en Angolo, la kruelan hombuĉadon en Vjetnamio kaj la nove estiĝantan faŝismon en diversaj landoj.

Ni apelacias al la interbatalantoj, ke ili ĉesigu la perarmilan kontakton kiel eble plej baldaŭ kaj pace solvu la tiurilatajn problemojn ĉe la konferenca tablo...”

La dua — speciale — korgojiga okazintaĵo de la MEM Konferenco estis la apero de la „Pacheroldino” de la japana MEM-sekcio — kun siaj paĝioj — ĉe la prezida tablo de la MEM-Konferenco. Transdonante la saluton de la japanaj geesperantistoj al la Konferenco, — kun emociiganta voĉo, Ŝi raportis, kiel konfiskis UEA-komitato en 1965 ilian esperantan flagon, signifantan solidarecon kun la vjetnamaj geesperantistoj, kaj samtempe pretendante: La USONAJ agresoroj forlasu Vjetnamion kaj konsideru la Svisan Kontrakton, faritan en 1954. Per arda voĉo Ŝi aldonis, ke la japanaj geesperantistoj pretigis la paron de la konfiskita flago — kiun ili kunportis al Budapeŝto — kaj spite de ĉio — ili sendos ĝin al vjetnamaj geesperantistoj.

Tiam la „paĝioj” elvolvis la flagon kaj du longaj esperantistoj levis ĝin alten.



K-dino Borbála Szerémi parolas

La grandaj, blankaj literoj krie anoncis la supre cititan tekston kaj sur la verda ŝtofo per ruĝa, blanka kaj nigra farboj skribitaj nomoj pruvis la solidarecon de japanaj geesperantistoj kun Vjetnamio kaj la samopinion kun la teksto.

Duonmil brilaj okulparoj rigardis emocie dum minutoj la flagon en plena silento, sed poste longdaŭra, entuziasma aplaŭdo esprimis la solidarecon kun la agado de la japanaj pabatalantaj geesperantistoj.

La virina Konferenco

La 7a konferenco de INEVKOM enhavis tri atentindajn, seriozajn kaj kortuŝajn partojn.

La unua estis tuj ĉe la komenco. Kiam la fondintoj de INEVKOM okupis lokon ĉe la prezida tablo, super kiu grandlitera surskribo diris bonvenon jene:

„NI SALUTAS LA 7-an KONFERENCON DE INEVKOM”

vico de hungaraj esperantistaj pioniroj — ĉirkaŭe 10—12 jaraĵoj — kun verda kravato kaj insigno, kun florbukedo en la manoj — paŝis al la tablo kaj transdonis al ĉiuj sinjorinoj — al membroj de la honorprezidantaro — po unu bukedon. Poste ĉarma, blonda knabineto kun varma, kortremanta voĉo — kun perfekta esperanta parolo turnis sin al la ĉeestantaj sinjorinoj per la jena, mallonga parolo:

„Karegaj Onjoj!

Mi ricevis la honorkomision, saluti Vin kun dankema koro — en la nomo de hungaraj esperantistaj pioniroj — okaze de la sepa Virina Konferenco.

Parolante la lingvon internacian, plie ni komprenas la signifon de la instruo de niaj gepatroj kaj instruistoj, — ke ni, infanoj, apartenantaj al diversaj nacioj, — parolantaj diversajn gepatrajn lingvojn, — estas ĝe-fratoj!



La infanoj atente aŭskultas



Čarma pionirino salutas la Virinan Konferencon

Ni jam komprenas, ke estas nepardonebla kulpo de plenaĝuloj, registroj, registaroj, se ili venenas nin per malamo kontraŭ aliaj nacioj... Kiu intencas doni en niajn manojn armilojn kontraŭ aliaj nacioj — se ni plenkreskos! Kiu sendas kontraŭ ni kaj niaj gefratoj kaj gepatroj bombojn por ekstermi nin!

Ni dankas Vin por viaj ĝisnunaj paclaboroj!

Ni petas Vin, daŭrigu ĝin pli fervore, — gardu nin, ŝirnu kaj defendu nin, infanojn de la mondo!

Varmege ni deziras, ke la patrinaj manoj, kiuj lulis nin, flegis nin, edu-

kas nin, — fariĝu ŝirmiloj de nia vivo!

Varmege ni deziras, ke la patrinaj koroj pleniĝu per mirakla forto kaj kuraĝo, por devigi ĉiujn sangosojfantojn retiriĝi antaŭ la forto de la sankta patrina amo!

Dankon al Vi, — benon al Vi, — vivu longe kaj feliĉe, — ĉar „... La nepoj Vin benos, se Vi paciencie eltenos!”

Jam ĉe la unuaj frazoj larmoj aperis en la okuloj de la aŭskultantoj kaj ĉe la fino de ŝia parolito la forta, longa aplaŭdo pruvis, ke la voĉo de la dankemo kaj peto, profunde tuŝis la patrinajn korojn.

Preskaŭ palpebla estis en la salono la pacemo de la virinoj. Ili akceptis unuanime la Pacrezolucion, la Alvokon al la esperantistinoj tutmondaj por kunlaboro. Jam dum la konferenco aliĝis s-inoj el multaj landoj al la virina movado, tiom profunden efikon faris la raporto pri la paclaboro, pri la novaj taskoj kaj laborplano de INEVKOM., celanta la pli efikan paclaboron.

LA DUA multsignifa rezulto de la laboro de Virina Fako de HEA. en la landa esperanta movado kaj en la laboro de 5la U. K. estas, ke naskiĝis la Hungara Esperantista Teatro-Artista Grupo! La V. F. de HEA., havanta la verkon de Marjorie Boulton, montris ĝin al la reĝisorino de Ŝtata Pupteatro — Anna Bánd —. Post la tralego kaj preparo de la kontraŭmilita dramo, la junaj geartistoj trasantante ĝian signifon, entuziasme akceptis la prezenton. Ili diligente lernis, sindone provis kaj produktis tian prezenton, per kiu ili ekzamenis ne nur el la Esperanta

lingvo, sed ankaŭ el sia arta talento kaj alta homa kulturiteco.

Per la brila, sukcesa prezento de la kontraŭmilita unuakta dramo de fr-ino M. Boulton: — „Ĉu esti, aŭ ne esti...” la junaj hungaraj esperantistaj geaktoroj rajte okupas lokon inter la jam en Esperanto-Mondo famaj „Bulgara Esperanto Teatro, — Teatro Populara de Lodz, — kaj Internacia Arta Teatro. Espereble ankaŭ ili akiros baldaŭ la rekonon de la esperanta publiko kaj la honoron de la kolegoj esperantistoj.

NUR LAŬVICE, sed ne laŭ ĝia signifo — sekvas la tria parto de la virina programo: la *G a s t a k c e p t o* ĉe la Landa Konsilantaro de Hungaraj Virinoj, en la „Artista Klubo — Fészek” (Nesto).

Signifoplena estas tiu invito de la prezidantino s-ino László Erdei, ĉar ĝi signifas ne nur ŝian interesiĝon por Esperanto, sed ankaŭ tion, ke Esperanto povas enpenetri en tiun gravan virinan organizaĵon. Krome, ke Ŝi kaj la eksterlandaj s-inoj povis renkontiĝi, vidi unu la alian, paroli kune, — eĉ se per interpreto — demandi unu la alian, ŝanĝi pensojn kaj opiniojn, kies interkroĉilo estis la Internacia lingvo, poste varme, amikece manpreni kaj adiaŭi unu la alian kun sincera „Ĝis la revido!” Tio signifas multon!

Ne estas sen valoro, kiun la hungaraj esperantistinoj faris por la disvastigo de Esperanto kaj en la intereso de paca apudvivado kaj la konservado de la Paco ankaŭ dum la 5la UK.

Senlace ni daŭrigos ĉi tiujn niajn trioblajn fiksitajn celojn!

Borbála SZERÉMI-TÓTH

Hilda Dresen


Nia tre konata E-poetino fariĝis 70-jara. Ŝi naskiĝis en estona kamparana familio la 11-an de majo 1896 en Kolga, Harjumaa. Ŝi fariĝis E-isto en 1913. Estis kunlaborantino de Literatura Mondo. Kiel en la Enciklopedio ni legas: „Ŝi estas nia plej aktiva verkistino. Ŝiajn verstradukojn karakterizas instinkte radika, ritma sento, riĉa rimtrova preteco, vivanteco de la lingvo kaj ia individua ĉarmo de l' esprim-

maniero.” Ŝia vigla literatura agado estis interrompita dum la dua mondmilito. Tiam, en 1941 la nazioj mortpafis ŝian fratinnon Helmi, kiu „estis la animo de la E-movado en Estonujo”. La sola restinta Hilda revenis nur en 1949 al sia amata laboro, la tradukado. En manuskripto troviĝas ŝia „Sub Polusstelo” kun 120 originalaj poemoj, kaj ankaŭ tradukitaj poemoj, kiuj atendas — la aperigon. Hungara Vivo ankaŭ en la nomo de la hungaraj esperantistoj deziras korege al tiu ĉi meritplena kulturbatalantino bonan sanon kaj pluan sukcesan verkistan agadon.



LÓRINC SZABÓ

(1900—1957)



Unu el la plej signifaj poetoj de la generacio post Endre Ady estas Lőrinc Szabó. La filo de provinca lokomotivestro baldaŭ fariĝas konata pro sia escepta talento, pro sia versosentema inklino. Apenaŭ li estas 19-jara, kiam kune kun Mihály Babits kaj Árpád Tóth li tradukas al hungara la kompletan Baudelaire. Ĝis apero de sia unua poemaro li publikigis ankoraŭ tutan vicon de brilaj tradukoj (Omar Khajam, Coleridge, Shakespeare-sonetoj). En liaj unuaj originalaj verkoj (1922—1926) la kolerega-anarkia ribelo kontraŭ la ekzistanta mondo, la deziro por renversi kaj malakcepti ĉion, sonas el liaj febraj, ofte de ekspresionismo influitaj, intermitaj panegiroj, ek-kriadoj. La tumultado kaj travivaĵoj de la moderna grandurbo, ĝis ekstremo akrigita erotiko ardas en ĉi tiuj poemoj. Ĉirkaŭ 1930 sekvas specifa trankviliĝo, la poeto ligas „apartan packontrak-

ton”, kaj lia ribelo ŝanĝiĝas je kompleta seniluziiĝo. Li perdas sian kredon je la intelekto, la kulturo, la homaj valoroj; ĉio fariĝas relativa, la ekzisto estas senseca, nur la formacioj de la materialo estas gravaj. Lia anarkia revolucio fariĝas glacie soleca egoista individualismo; lia poezio inter la cirkonstancoj de la kapitalismo fariĝis izoligitaj doloraj agresaj konfesoj de lirika individuo. Tiujn ĉi procezojn, animluktaĵojn, problemoserĉojn peras al la leganto intelekta poezio kun alta temperaturo.

Ekde la mezo de la 30-aj jaroj la poeto proksimiĝas al la dekstrula politiko, eĉ al la faŝismo. (Tiu ĉi mispaŝo estas precipe kondamninda ĉe tiel granda talento.) Tamen la jaroj de la dua mondmilito skuis ankaŭ lin. En 1945, post la liberiĝo li sentas la bezonon por traesplori sian vivovoĵon, kaj el tiu klopodo naskiĝas unu el liaj plej belaj poemverkoj. Ĝi

estas lirika membiografio, konsistanta el bonege konstruitaj pecoj. Jaron antaŭ lia morto aperis lia ciklo sub titolo: *26 jaroj*, memore al granda amo, poezia monumento al la mortinta amatino.

Lőrinc Szabó kiel tradukisto fariĝis inda posteulo de la generacio de la revuo *Nyugat* (Okcidento), eĉ en intelekta forto, precizeco kaj en amplekso de la traduka vivoverko li superis la antaŭulojn. Shakespeare kaj Goethe, Villon kaj Kleist povas danki al Szabó la plej sukcesan interpreton al la hungara lingvo.

(Laŭ Miklós Szabolcsi)

El la poemoj de Lőrinc Szabó

EN LA ARBARO DE L'ENVIO

*Mi sidis en arbar' de majstro Ĝuang Dzi,
kaj diris floro unukrura:
— Ho ve, miriapod'! Jen mi restadas stare,
ja bone al vi, rapidkura!*

*Kaj la miriapod' respondis: — La serpenton
enviu! Tiu ne posedas
piedon, sed ĝin pli rapide movas ripoj,
ol centpiede mi piedas.*

*Rigardis la serpent' ĉielflugilon bluan.
— Ho vento! — ĝi lamentis jene —
la oceanon vi ludante transsusuras,
en polvo mi min trenas pene.*

*Rigardis min la vent': — Ho vido, vi min venkas,
vi senflugila senkorpulo!
— La penso venkas min! — respondis al ĝi triste,
palpebroferme la okulo.*

*Respondi volis jam la penso, sed la koro
devancis ĝin: — Ho ve, sufero!
— mi ploris. — Ĉie nur troviĝas malkontento,
batal', barakto, malespero.*

*Kaj diris Ĝuang Dzi: — Ja vane! Jen la leĝo
en la arbaro de l'envio.
Vivu kaj luktu kaj ne zorgu pri la vivo,
mortu, kaj zorgu nek pri tio.*

Tr. L. Tárkony

EN PEZAJ TAGOJ

Prenu do certa ĝin kaj mortu. Nur ne timu. Diru: ĝi finiĝos. Kelkaj inferaj tagoj, poste la nenio. Vi vidis ja skarabon, ĉu ne, vidis ĝin duon-distretita, kiam ĝi per siaj restaj membroj la intestojn pendantajn trenis en la polvo. Tio doloris eĉ ne tiel longe, kiel via kompato. Ankaŭ vi nelonge doloros. La turmento estas ja nur anticipe tiel daŭrpersista. Memoru, vi eltenis la dentiston, vi preskaŭ amis tiun fulmotondran borilon en la viva nervo: plaĉis al vi la trejno, la artefarita indiferent', el kiu fine forton, kirason hardis jam la malespero. Pri tio pensu, mizerulo! Kial vi dentoklakas? Kaj pri tio pensu, ke tiel ajn vi devos morti, kaj ke tiel vanas ĉiu plan' kaj revo. Kion vi volus, ja por tio ne sufiĉus kvincent jaroj da homvivo. Pri tio pensu, ne nur pri l'malbono, pensu pri l'plejmalbono: vi trompiĝos kaj konsoliĝos... Kaj mirakl' ankoraŭ troviĝas, ne nur morto... Nu, ridetu! Ankaŭ maltrafi povas fulmo... Kial do fuŝi ĉi septembron superbela?... Ankoraŭ jen flankumas la somero... Rigardu, kiel grimpis la kukurbo en la ĝarden' sur la prunarbon: ĝiaj folioj, verdajn elefant-orelojn simile, streĉas sin sur branĉosuproj, en alto de etaĝo ĝiaj floroj paradas kaj iliaj ortrumpetoj jam preskaŭ kokerikas, tiel ili albrilas, alentuziasmas al via fenestro, ke ankoraŭ estas ja kredo kaj ambicio kaj sukceso, ankoraŭ estas venko en ĉi mondo.

Tr. K. Kalocsay

NOKTO INTER MONTJOJ

En la nigregan nokton mi elpaŝis. Nek lun', nek steloj. Timiĝinta solo sur min ŝrumpiĝis: momenteto, kaj kvazaŭ blindiĝis kaj sur mian haŭton striktiĝis la ekstera mondo. Poste, lante kaj songmaniere renaskiĝis la univers' el la nenio vaka: la spaco eksonoris, la pejzaĝo rekonstruiĝis el la nevidebla korpo de voĉoj kiel mondo de spiritoj: nun la dismuĝanta eĥo de la torento levis la duopan muron de l' val', kaj la malaperintan kamparon, kiel vualleĝeran kaj sonoratan molbalancan marĉterenon alfluis la muziko de la griloj. Atentis mi kaj kun mi la pejzaĝo. Ekventis, branĉo krakis... Etaĵ bruoj de buŝ' al buŝo donis la eventojn: Kapreolet' ekiris de l'montsupro al fonto... nun ĝi haltis... el funelo de Konvolvul' ruliĝis Kokcinela... el sub la tero dumil Lekantetoj elŝovis sian kapon... streĉis sin

LÓCI FARAS POEMON

Ŝafido paska antaŭ l'festo en la ĝardeno bleketadis, ekfloris la pomarb', la vestojn l'abrikotuj' jam demetadis,

kaj mi la vivon kaj la morton en versojn kapti prepariĝis, kiam, jen, Lóci pordmalferme envenis, antaŭ mi stariĝis:

— Paĉjo, mi skribis versojn, aŭdul
— Vi eĉ ne scias skribi. — Do, ne skribis mi, nur elpensis tion.
— Mi aŭdu do. — Atentu bone!

Dirinte tion, li komencis, duverse jene li kadencis:
— Vivon doni li komplezas, donas, poste doni ĉesas.

Mi gapis. — Kiu do, pri kiu temas? La tuto estas tio?
— Pri dio, — la infan' klarigis — mi ankaŭ ĝin titolis: Dio.

— Aldoni ion ne necesus? — nun jam scivole mi lin sondis.
— Ne, ja ne, jen la vivo. Ĉio en ĝi enestas, — li respondis.

— Enestas, prave! Belaj versoj. Reiru nun al la ludilo. — Kaj preskaŭ time kisis mi la sesjaran frunton de la filo.

Li kuris for... Ekstere brilis printempo, sonis ŝafidbeo. Enpensiĝinte mi ĉi versojn skribis anstataŭ propra kreo.

Tr. L. Tárkony

Olda Fagejo... glitis Bubal-Roko pli infren kaj nun regustigas sian ĉifitan kapsubaĵon... jam denove kverelas ge-Lukanoj... — Mi nur staris inter ĉi voĉoj lirlaj, dum de ĉie tumultis, vibris voĉoj, novaj voĉoj ligante-malligante, milionoj da voĉoj teksis reton ĉirkaŭ mi, milionoj da bruetoj teksis min en teksaĵon vivan de l'pejzaĝ', milionoj da agrafetoj... Kaj pli kaj pli riĉe min ĉirkaŭpulis la sonora tempo, sonoris mi en la pejzaĝo kaj sonoris la pejzaĝ' en mi, ĉi tiu muzik' dismetis ĉiun mian fibron, dismetis min, forblovis, traŝlirtigis super arbaroj, kampoj, montoj, valoj, min investante inter ĉiujn fratajn substancojn de l'ĉielo, ter', aero, kaj mi, en tiu nigra sol' timiga, kiel la vekigint', per unu fojo trankvile kaj feliĉe disrigardis: ja mi ne estas kaj neniam estos, eĉ en la tombo mi ne estos sola.

Tr. K. Kalocsay

SUR LA MALDEKSTRA BORDO DE DANUBO



La propra teritorio

En la 2-a n-ro de Hungara Vivo 1966. aperis bela artikolo de la konata verkisto — Sándor Szatmári, pri la „Danubkurbiĝo”. La prezento de ĉi tiu — proporcie — mallonga etapo, de la historia kaj episkopa urbo Esztergom (Esztergom) ĝis Budapeŝto, kaj historie kaj panorame estas interese priskribita, indas koni ĝin el ambaŭ vidpunktoj. Malgraŭ tio, mi trovas la artikolon „unuflanka”, ĉar ĝi traktas la pejzaĝon, kvazaŭ Danubo havus nur unu bordon. Por, ke ne renversigu ĝia ekvilibro, aŭ por eviti problemon pro „ofendiĝo” de la transa flanko, mi decidis: priskribi la maldekstran parton de Danubo, laŭ la samaj vidpunktoj, kiel la dekstra parto estas prezentita. Jes, laŭ la samaj vidpunktoj, sed nek historie, nek socie, nek distance mi prezentas tiun parton de la Danubbordo simile al s-ano Sándor Szatmári. Eĉ, la direkto de la priskribo estos malsama.

Por iom tuŝi la geologian elformiĝon, — la konatigon de la historio de la Danubangulo li komencas per la mezepoko. Socie ĝi respegulas la feŭdalan sociordon, — iom eĉ la kapitalismon — flanke de la reganta klaso.

Mi konatigas la maldekstran bordon de Danubo ekde la insulo Csepel (Ĉepel), situanta sude de la ĉefurbo. La norda fino de la insulo nun apartenas al Budapeŝto, kiel ĝia XXI-a

distrikto. Antaŭ 1945 ĉi tiu parto estis la plej granda laborista periferio de la ĉefurbo. Ĉi tie estis la unua industria kombinato posedata de la plej riĉa industria magnato — Manfred Weiss. Li fondis la ŝtalfabrikon. Li fabrikis municion por la hungara armeo kaj eĉ por eksterlando. Li tiom riĉiĝis dum la unua mondmilito, ke dum la 20-aj jaroj li fondis ankaŭ la paper- kaj teksaĵfabrikojn sur la sama insulo en la najbareco de la ŝtalfabrikejo. Tiutempe 10–15 mil gela-laboristoj laboris en la fabrikoj de Manfred Weiss.

Post la malvenko de la laborista potenco en 1919 la revolucia spirito plifortigis kaj plidivastigis inter la laboristaj amasoj. Same la senlaboreco. Ĉi tiuj du faktoroj la amasojn tiris de la trinkejoj al la turismo, atletismo, al la lernado de Esperanto, al ideologiaj kaj revolucitendencaj literaturaj libroj.

Kiam alvenis la varmegaj someraj tagoj, ankaŭ la laboristaj amasoj de la ĉefurbo estus ŝatintaj ĝui la freŝigan akvoekskurson al la bordoj de Danubo. Sed por ili jam ne estis konvena loko en la proksimeco de la ĉefurbo. Ĉiun por tiu celo konvenan lokon eksproprigis la riĉaj, burĝaj sportkluboj kaj monaristokratoj. Ne restis alia ebleco por la ĉefurbaj laboristaj familioj: tiriĝi suden al la bordo de Danubo apud Csepel. Tiu loko tamen

estis nekonvena. Unue: la rivero kunportis tien ĉiun malpuraĵon de Budapeŝto, due: la bordon kovris diversaj ruboj, elportitaj de la urbo, do efektive malpuraĵo. Mankis arboj kaj sablo. Estas memkompreneble, ke la laboristaj ekskursantoj estis malkontentaj kaj malbenis la sociordon, kiu traktas ilin tiamaniere.

Poste la grupoj de diversaj fak- kaj kulturorganizaĵoj elsendis ekspedicion, serĉi konvenan lokon por la sekvonta somero norde de Budapeŝto.

Aŭtune ekiris la ekspedicio por plenumi la taskon. Post monato, okaze de komuna ekskurso, dum ripoza tempo, preskaŭ spirretene aŭskultis la turistoj la raporton pri la rezulto de la loko-esploro. La fakto estis la jena: norde de la ĉefurbo, post la akvo-centralo ĝis la limo de la episkopa urbeto Vác, — situanta ĝuste ĉe la Danubkubuto — la bordo de la rivero estas ĝangalo. Sovaĝa teritorio. Kvantam ĝi estas sabloriĉa kun maljunaj salikoj kaj altaj poploj, sed la fontoj, — abunde fluantaj — marĉigas grandan teritorion. Kano kaj kariko regas grandajn partojn. La gvidantoj de la vilaĝo donas senpage tiun senvaloran parton, se la turistoj kulturos ĝin.

Longa silentado, meditado sekvis la raporton, sed poste sekvis pli longa, vigla diskutado. Baldaŭ naskiĝis la decido: ni devas konkeri tiun sovaĝan teritorion, kulturi ĝin, iom post iom krei tie ripozejon, somerumlokon, strandon por ni mem!

La sekvantan printempon, kiam retiriĝis Danubo en sian fluujon, laboristaj karavanoj ekiris piede norden, kontraŭ la fluo de la rivero. Ili kunportis fosilojn, segilojn, hakilojn kaj aliajn laborilojn.

Dudek kilometrojn piedis la gajaj, diversaĝaj viroj kaj virinoj, kiam ili trovis la lokon elprovidan por ekloĝiĝo. La bordo en longeco estis diversa. Kelkloke ĝi estis 2–3 metrojn alta argilmonteto, kiu — kvazaŭ subite estus tranĉita kolere, per forta mano poste larĝigante, oni formis regulan golfon, kiel egan neston, kies flankoj estis ornamitaj dense per pugno-grandaj truoj, per la nestoj de multaj centoj da bordaj hirundoj.

Ĉi tiu loko tuj ricevis la nomon: „Fészek” (nesto). Sed ĝia fundo ne estis videbla. Efektive ĝi estis multjara dornejo, kies sekiĝon devis atendi dum kelkaj semajnoj kaj poste bruligi ĝin. Sen tio eĉ alproksimiĝi ne estis eble.

Oni fondis laborgrupojn, kies taskoj estis malsamaj. Ekz.: serĉi la devenojn



Inaŭguro de parto de la Danubo-bordo, kiun la esperantistoj ekposedis

de la fontoj, fosi laŭregulajn defluojn por la akvo, elhaki la dense kreskantajn ŝosojn, kiujn oni povis utiligi por konstrui kabanojn. Oni devis kolekti la ŝtonojn, same utiligi ilin.

Post du monatoj „Fészek” estis tolereble civilizita loko, dividita por tendoj, kuirejo, sportejo kaj por infanoj ludi. Ĝi estis parte sabligita, parte kovrita per herbo, — precipe sub la arboj.

La plej granda trezoro estis la akvo-kondukilo. Kelkajn fontojn unuigis la laboristoj, kunligis ĝin en cementitan tubon, kiun ili konstruis en ŝtono kolonon, el kiu konstante fluis la bonega malvarma, pura fonto-akvo.

Kaj la bordo mem?!

Ĝin kovris la plej pura gruzer' kaj sablo-tapiŝo, deklive etendiĝante longe en la riveron. Naĝi ne estis danĝere eĉ por la infanoj.

Somere jam svarmis la laboristaj ekskursantoj sur la bordo. La malfruaj posteuloj de forpelita, pekinta Pra-Adamo, konkeris kaj resorĉis „per ŝvito de sia vizaĝo” ĉi tiun malgrandan parton de sovaĝiĝinta Edeno.

Sed baldaŭ aperis la ĉefanĝeloj, — ne per flamglavegoj, sed en moderna ĝendarmuniformo, kaj per bajoneta pafilo sur siaj ŝultroj, sur la kapo la ĉapo ornamita per koko-vostoplumo, defie zigzagate de la venteto. La forpelo ne sukcesis, ĉar ĉi tiuj modernaj adamoj ne estis tiom obeemaj, kiom ilia pra-prapatro. Vere — ke ili ja ne estis jam senarmilaj, kiel la iama „Paĉjo” estis. Ili havis la plej potencon armilon — la paper-dokumenton pri tio, ke ili rajtas okupi kaj krei por si la novan „Edenon” sur tiu parto de la Danubo.

De tempo al tempo montriĝis la rezulto. Preskaŭ metron post metro kreskis la kulturita parto. Oni konstruis familiajn dometojn el ligno; 10—15 personoj, junuloj aĉetis kune unu tendon, kies nombro de somero al



Vojprete, al Budapeŝto



Laboristoj kaj — du ĝendarmoj

somero plimultiĝis. Ankaŭ plimultiĝis la nombro de la „nomadoj”. La senlaboruloj la tutan someron pasigis tie, nur okaze ili reiris al la ĉefurbo. Kiuj laboris, parto de ili venis tien jam sabate posttagmeze, parto nur dimanĉe frumatene ekiris al la komuna „somerumejo”. La plimulto iris tien kaj reen piede, ne havante monon por trajno. Ĝajaj karavanoj kantis popolajn kaj laboristajn kantojn, rakontis anekdotojn, diskutante politikajn okazintaĵojn, ktp.

Ĉi tiu loko fariĝis ne nur ripozejo de organizitaj gelaboristoj, sed ankaŭ amuzejo kun subĉiela teatro, en kiu rolis ili mem, sportejo kaj politika lernejo, kie amase oni eksciis, el kio doniĝas la ekstraprofito kaj kial estas bezonate por la kapitalistoj la senlaborula rezerva-armeo...

Sur ĉi tiu parto de la maldekstra bordo de Danubo ekstermis fortaj manoj de la gelaboristoj, la malutilajn kreskaĵ-ĝangalon kaj plantis anstataŭe florojn kaj fruktuojn, — sed ankaŭ el la kapoj, el la pensoj ekstermis la malutilajn ideologiojn saĝaj revolucioj...

Post dek jaroj ne estis rekonebla la maldekstra bordo de Danubo de Budapeŝto ĝis la episkopa kaj fama karcer-urbo VÁC. Malaperis la sovaĝa teritorio pro la forta volo, diligenta laboro, pro la kreo-kapablo de la laborista amaso... Ĉi tiu parto fariĝis ĉarma ĝojo-ĝardeno de klaskonsciaj gelaboristoj — nur iom pli malriĉa kaj pli modesta, ol la dekstra parto de Danubo...

Dum la milito ĉio detruigis, sed post la liberiĝo, — same, kiel la detruita lando — ankaŭ ĉi tiu parto estis rekonstruita, eble pli lukse ol en la pasinto. Sed nun jam ne estas diferenco inter la du bordoj, ambaŭ estas viziteblaj por ĉiu, eĉ por eksterlandanoj...

Sed nun oni ne devas piedmarŝi tien, ĉar ĉiu povas pagi la veturkoston...

Jen, la mallonga historio de la maldekstra bordo de Danubo ĉe kaj supre de Budapeŝto.

MOZAIKO PRI JULIO BAGHY

„Paĉjo“

Renkontiĝoj kun Julio Baghy

Jam aŭtune, en 1920, komenciĝis esperantaj kursoj en la faksindikatoj kun multaj laboristaj geaŭskultantoj. La kaŭzo de la granda interesiĝo estis tio, ke la organizitaj gelaboristoj sopiris je demokrata aero kaj interkontaktiĝo el demokrataj landoj. Jes, ja la venkitan Hungaran Konsilian Respublikon sekvis blanka teroro, la faŝisma horthy-reĝimo, kiu subpremis ĉiun demokratan movadon.

Dank' al tiuj bone parolantaj laboristaj esperantistoj, kiuj ne estis enkarcerigitaj kaj ne rifuĝis eksterlanden, sed restis hejme — inter ili Mihaelo Zsámboki (M. Ĵamboki), Johano Sturm (Ŝturm) Jozefo Nagy (Nadj) k. a., kiuj faris propagandon por Esperanto, provante tiel efektivi la menciitan sopiron de la plej progressa tavolo de la laboristaro.

Ili gvidis la kursojn, krome pensadis praktike kaj en perspektivo: — por la laboristoj estas bezonata pli simpla, pli mallonga lernolibro, ol la tiam uzata 20-leciana „Polgár-lernolibro“. Ĉi tiun problemon ili solvis, redaktante 12 lecionan gramatikon, kies spirita enhavo konvenis por progresemaj gelaboristoj.

Antaŭ ili estis klare, ke ne sufiĉas la tielnomata „kuireja“ parolo, sed ankaŭ la laboristoj bezonas pli altan klarecon ankaŭ en la esperanta lingvo. Por tio estas bezonataj progresaj kaj superaj kursoj.

Por tiu celo ni ne havis kursgvidantojn.

... Iun frusomeran dimanĉon ni ekskursis. Kiel, kiel ne, falis inter nin svelta, pikrigarda, ĉirkaŭe 30-jara viro kun karakterizaj trajtoj. Dum la tuta vojo li emis paroli nur esperante. Ŝercon li faris post ŝerco. Mokis la hungarmaniere akcentantajn esperantistojn citante, imitante ilin. Tio elvokis egan plaĉon kaj ridon ĉar tiamaniere la vortoj ricevis puran hungaran signifon (Ekz.: „... *Ebura fako* ... (*eb* = hungarlingve estas sinonimo de hundo, — *ura* posedanto. — *fako* koloro, kiu jam perdis sian originalan koloron. Sed la vorto „fako“ signifas ankaŭ ĉevalon, havanta helan, sed malcertan koloron. Do: „*Eb-ura fako*“ signifas: „La posedanto de la hundo estas la ĉevalo“, t. e.: „Ne mi estas la respondeca ...“

Alia: „Kaj la marĉa teritorio...“, elparolate kaj akcentate hungarmaniere, ĝi sonis jene: „Kajla Marĉa, Teri to ri“. La vorto „kajla“ signifas, se la korno de la bovo kreskis turniĝante al la tero. — „Marĉa“ = prononcite kamarane: Marinjo. — „Teri“ = Terinjo, — „to“ = lago „ri“ sinonimo de „ŝir“, kiu egalas: „ploras“. Do, prononcante hungarmaniere „Kajla Marĉa“, signifas virinan nomon, en kiu la familia nomo estas „Kajla“, la propra nomo estas „Marĉa“).

Kiu li estas? Kun kiu li venis al ni? — suflore ni demendis unu la alian, — sed nur posttagmeze, kiam improvizan programon prezentis kelkaj el la ekskursista grupo — inter ili ankaŭ la nekonata viro — ni eksciis lian nomon: Julio Baghy. Tio diris al ni nenion, ĉar li ne estis konata al ni, sed kiam proponis „enigmo-solvo“ ludon kaj li mem tuj donis la taskon: — ni eltrovu, kian frukton li manĝas? Ĉi tiu ekskurso estis efektive progressa kurso.

Sub ĉi tiu impresio la gvidantaro parolis kun s-ano Baghy kaj post semajno ni jam organizis la progresan, poste la superan kurson, kiujn li gvidis. La supera kurso estis kunligata per praktikado de instruado de komencantoj.

Jen, tiel fariĝis Julio Baghy „Paĉjo“ ankaŭ por multaj laboristaj geesperantistoj, — edukante ilin gvidantoj de progresaj kaj superaj kursoj.

B. SZERÉMI-TÓTH

Jam pli ol kvardek jaroj forpasis de tiu tempo, kiam mi iĝis esperantisto. Kiel amanton de literaturo, min baldaŭ altiris la floroj de la lingvo, la ĝojplenaj aŭ malgajaj, buntaj, fantazion movigantaj, la vibradon de l' animo esprimantaj poemoj de Baghy. Liaj poemkolektoj: *Preter la vivo* kaj *Pilgrimo* iĝis mia ĉiutaga legaĵo en mia urbeto apud Danubo. Estas memkompreneble, ke mi deziris ekkoni persone la aŭtoron de tiuj poemoj, kiuj donis al mia freŝbakita esperantisteco tiom da plezuro. Mia deziro baldaŭ plenumiĝis. En 1926 li pasigis kelkajn tagojn en la slovakia ĉefurbo, kaj mi — eksciinte pri tio — veturis tien por lin persone ekkoni. Mi trovis lin en granda societo, inter kies anoj estis en plimulto la lin ĉirkaŭantaj virinoj, kiujn ĉarmis ne nur liaj poemoj, sed ĉefe lia ridetanta, petolema naturo, kaj kiujn li per siaj bohema humoro, per spritaj komplimentoj kaj flirtplena juneco ebriigis. Ĉu mirinde do, ke li apenaŭ volis kaj povis disigi de ĉi ĉarma societo? Tamen poste ni povis pasigi duope horon en iu trankvila kafejo, kie li donis al mi la permeson traduki kaj aperigi el liaj verkoj hungarlingve. Tiuj tradukoj poste aperis en la ĉeĥoslovakiaj hungaraj revuoj kaj gazetoj. Sendinte ilin al li, mi ricevis de li respondojn, al kiuj ofte estis aldonitaj kelkaj el liaj novaj poemoj.

Pasis la jaroj. Alvenis la Budapeŝta (1929), poste la Pariza kongresoj, dum kiuj — eĉ se nur por minutoj — ni povis kunesti kaj paroladi. Dume aperis liaj novaj verkoj (*La vagabondo kantas*, *Dancu marionetoj*, *Hural*, ktp.), kiuj donis eblecon kaj pretekston al reciproka korespondado.

Kiam en 1947 mi estis devigata — vole-nevole — forlasi mian hejmon, mi iĝis budapeŝtano kaj de tiu tempo niaj personaj renkontiĝoj plioftiĝis. Mi frekventis lin en lia tro modesta hejmo, aŭ ni renkontiĝis en kafejo. Tiuj kunestoj estis ĉiam min riĉigantaj okazoj, ĉar li dum ĉi kunestoj ĉiam konatigis min ne nur kun siaj novaj kreitaĵoj, sed informis min pri la ĉilanda movado, pri la okazintaĵoj de la vasta esperanta mondo.

Nia kara Julio Baghy dum la ĵus pasinta Universala Kongreso en Budapeŝto denove povis spertadi la amikajn kunsentojn kaj la amon, per kiuj li estis ĉirkaŭata dum ĉiuj tagoj de la granda kongreso.

Jozefo REININGER

Tri renkontoj

La granda parko de la mezlerneja instituto, aliajn fojojn laŭta pro la gaje svarmanta knaba amaso, nun silente varmigis sin en la printempa sunbrilo. Estas Pasko de 1932. La edukatoj ferias en sia hejmo. Nur unu lernanto — sepaklasulo — promenas sub la ankoraŭ senfoliaj arboj. Li legas. Aŭ ĉu eble li lernas? Versajne, ĉar vortojn li parkerigas: „ĉambro, libro, bela, longa... mi legas, ... ŝi sidas“... Kun avida scivolo, kun la ekscita ĝojo de grava malkovro li lernas, — kaj senhalte, senlace lernas dum la tuta Paska ferio, por demeti la libron tute tralernita la lastan tagon.

Jen mia unua renkontiĝo kun Julio Baghy, pli ĝuste kun lia bonega meminstrua lernolibro, kiun tuj sekvis la unua romano: *Viktimoj*.

Tri jaroj pasis. En malvarmeta vespero juna soldato rapidas al la modesta kunvenejo de ĉefurbaj samideanoj, Esperanta Rondo Amika. Suspekteme oni malfermas la pordon: la uniformo ne estas bonvena en tiuj tempoj en rondoj esperantistaj. Sed la vizaĝoj baldaŭ afabliĝas, kiam la soldato ekparolas en flua Esperanto, kaj ankoraŭ pli, kiam li deklamas soneton memtradukitan. Alta, malgrasa, bruna viro kun neĉiutagaj, karakterize intelektaj vizaĝotrajtoj kore manpremas kaj gratulas al la noveveninto, kaj la konversacio baldaŭ tuŝas komunajn temojn: la iama militkaptito rakontas pri Siberio, pri la „Sanga tero” — al la estonta militkaptito sur franca tero. — Tio estis mia dua renkontiĝo.

*

La kruela dua mondmilito forpasis. Sed ĝiaj postsignoj longe daŭris, malfaciligante, maldolĉigante nian ĉiutagan vivon.

Forlasinte la bombotrafitan loĝejon mia familio trovis rifuĝejon en neloĝata domo, en periferia kvartalo de la ĉefurbo. La tiama ĝenerala sekureco estis ankoraŭ sufiĉe mankohava. Al tio estis imputeble, ke hejmenveninte unu tagon ni trovis la loĝejon perforte malfermita. Konstatinte, ke oni forportis kelke da mebloj, tuj mi rapidis al la centra policejo kaj faris personan denuncon.

La deĵoranto aŭskultis mian plendon, skribis mallongan raporton kaj direktis min kun la skribaĵo en unu el la multaj ĉambroj. En la ĉambro, ĉe la skribotablo sidis alta, malgrasa, bruna viro kun neĉiutagaj, karakterize intelektaj vizaĝotrajtoj... Jes, mia tria renkontiĝo kun Paĉjo okazis en la policejo! Tie li laboris, kiam la lando treege bezonis la sindonan laboron de fidindaj personoj por stabiligi la publikan sekurecon, tiun nemankeblan premison de la paca landkonstrua laboro. — Dank'al lia energia kaj tuja instrukcio baldaŭ oni trovis la forportitajn meblojn kaj zorgis pri ilia reportigo.

*

De tiam okazis multaj renkontoj. Mi vidis lin salutparoli en Universalaj Kongresoj, kaj kuŝi en hospitala lito; mi promenis kun li konversaciante sur vesperlumaj stratoj, kaj anoncis antaŭ sceneja kurteno lian aktoran ludon; mi kunsidis kun li en redakciaj kunvenoj, kaj vidis lin ovaciita kiel aŭtoron post bonsukcesa teatraĵo. Tamen la unuaj tri renkontoj estis por mi la plej memorindaj, la plej neforgeseblaj.

Tibor Ujlaky-Nagy

Gaja historieto pri la Amuzanto

Memkompreneble, temas pri Baghy, kiun — kun aliaj, por ŝi karaj amikoj — eternigis la konata kaj ŝatata verkistino, *F-ino Marjorie Boulton* en sia ĉarma verketo: *Dekdu Piedetoj*.

Ĉi tiun eltiraĵon — kiel miozoton ni metas inter la aliaj mozaikmemorfloroj, el kiuj ni faras bukedon kaj transdonas ĝin al Li kun multaj, multaj bondeziroj okaze de lia naskiĝtago 75a.

„... Sed la plej kria sensacio en nia strateto estis dum tiu vizito de Julio Baghy, post la Universala Kongreso en Harrogate. Ni estis invititaj al festmanĝo en la urbdomo, kun granda grupo de italaj esperantistoj. Montevideo (ŝia kato) ne estis invitita. Sed kiam ni jam estis iom malkomfortaj en niaj elegantaj vestaĵoj, la telefono sonoris. Ĉu la italoj en sia aŭtobuso rajtos unue halti proksime al mia hejmo — por vidi, fotografi eĉ filmi la faman katon kaj respekte saluti mian patrinon? Mi ne dubis pri la taŭga konduto almenaŭ de mia patrino, kaj jesis. Mi portis la katon eksteren; mi tenis ĝin en miaj brakoj kaj per unu mano tenis ankoraŭ kondukrimenon. Motorbiciklo preterpasis sur la ĉefstrato kun eksplodoj kaj muĝo: Montevideo ektimis, risorte piedbatis mian bruston, rompintis la kondukrimenon kaj malaperis inter la arbustoj de iu najbara ĝardeno. La piedbato estis tiel forta kaj la tuta evento tiel fulmrapida, ke mi tute ne vidis la forkuron.

Julio Baghy alvenis ĝustatempe por vidi min kun senkata rimenopeco en la mano kaj tia mieno, kian oni kelkfoje vidas sur la vizaĝo de la luno.

La kato rimarkinde mankis.

Kelkaj kurtenoj moviĝis ĉe najbaraj domoj, sed neniu folio moviĝis en la najbara ĝardeno, por sugesti, ke kato sin kaŝas tie.

Mi daŭre mienis kvazaŭ aŭtuna luno aŭ nederlanda fromaĝo kaj firme tenis la rimenpecon por ke ankoraŭ tio ne eskapu; sed la kara veterana aktoro, kiu jam dum kelkaj tagoj studis la siaman lingvon kaj eĉ parolis ĝin, subite ekagis. La longaj grizaj haroj hirtiĝis en la vento; Julio Baghy iris tien-reen tra nia strateto, gestante, grimacante kaj eligante serion de miaŭoj, adekvataj por trompi ne nur homon, sed katon. Dum junulinoj hazarde alvenis sammomente.



„Miaŭ! Miaŭ! Miaŭ!”

Ili videble hezitis. La poeto volis klarigi kelkvorte al ili, ke li ne estas freneza, li vokas katon; sed bedaŭrinde li ekklarigis hungare. La junulinoj rapidis al la fino de la strato, malgraŭ la ĉarma rideto kiu estis lia dua provo klarigi; la kurtenoj pli moviĝis. „Miaŭ! Miaŭ! Miaŭ!” Sed finfine reehis el la ĝardeno timema, mallaŭta „miau”. Julio Baghy turnis la kapon kaj la miaŭadon tiudirekten. La eĥo plilaŭtiĝis, ĝis Montevideo reaperis kaj kuris al sia fidinda amiko, samlingvano, kelkajn minutojn antaŭ la alveno de la itala grupo. „Neforgesu iam rakonti”, diris la kara homo, „kiel mi remiaŭis ĝin!”

Kiam mi esperantiĝis?

Ni vagadis sur la Danuba kajo. Mi, kaj Julio Baghy. Bela, printempa tago estis. Antaŭ nur kelkaj tagoj finiĝis la nebula, malvarma vetero kaj la Suno, kvazaŭ ĝi intencus kviti sian ŝuldon, nun despli malavare verŝis la vivigajn radiojn al la renaskiĝanta Tero.

— Kiam vi esperantiĝis? — demandis subite Paĉjo.

La respondo ne estis tiom facila, kiel la demando sonis. Post iom da meditado mi diris:

— Mi estis 21 jaraĝa, kiam mi trastudis detale la gramatikon kaj mi legis la unuan libron. Klare mi memoras: ĝi estis „Tri rakontoj” de Tolstoj.

Dume ni venis al parkita placo; inter la herbobedoj logis nin benkoj.

— Ĉu vi ne emus sidiĝi iome? — demandis Paĉjo. — La vetero estas tre bela.

Ni sidiĝis vidalvide la sunon kaj mi soife sorbis la vivigantajn radiojn...

— Do, vi esperantiĝis en via 21 jara aĝo — konkludis Paĉjo.

— La afero ne estas tute klara, — mi diris hezite, — ĉar mi jam antaŭe sciis pri Esperanto kaj mi foliumis la gramatikon. Do, la dato de mia esperantiĝo dependas de tio, kiel ni difinas la sencon de „esperantiĝo”.

— Esperantiĝo signifas: fariĝi adepto de Esperanto.

Tiu difino vekis novajn pensojn en mi.

Nome, mi eksciis pri la ekzisto de Esperanto en mia dekkvara jaraĝo. Tiam mi tralegis unufoje mallongan gramatikon el „ŝlosilo” kaj tuj mi eksentis, ke tiu grandioza kreitaĵo estas la plenumo de miaj deziroj, vivanta delonge en mia animo.

Sed tiuokaze...

— Tiuokaze mi estas esperantisto jam antaŭ ol mi sciis pri la ekzisto de la lingvo — mi diris.

Ridete mi rigardis al Paĉjo, kredante, ke mi diris amuzan ŝercon kaj mi atendis la efikon de mia spritaĵo.

Sed Paĉjo tute ne ridis pri mia paradokso. Vigle, sed sen iu ajn surprizo li respondis:

— Tre prave. Ĉiam mi diris, ke vera esperantisto ne fariĝas, sed naskiĝas. Vera esperantisto havas specialan, denaskan naturon: li klare komprenas la unuecon de la homaro kaj despli estas al li fremdaj la fortoj, kiuj disigas la homojn al malamikaj grupoj. Esperantismo estas laŭnaska trajto. Instinkto. Iaspeca supergrupa psikaĵo, destino, misio.

La printempa suno brilis plenforte. Al mi ŝajnis, eĉ pli bele. Brilis la ĉarma, homarana animo de Baghy en la mond' eterne militanta.

Sándor SZATHMÁRI

Paĉjo - kaj Miskolc

Dum la lastaj jaroj nia kara Paĉjo ofte vizitis nian urbon Miskolc, kie li post la hospitalaj flegadoj vere ŝatis kaj povis ripozi. Li ĝuis ĉi tie la trankvilon, la kurac- kaj grotbanejon de Miskolc-Tapolca kaj ne en lasta vico — la amon de la esperantistoj de Miskolc. Komprenoble, alparte ili riĉiĝis fare de valoraj prezentadoj, spritaj, bonhumoraj interparoladoj, rakontoj, kiuj forflugis el la ridetantaj lipoj de Paĉjo.

Ho, kiel li ŝatas fabeli antaŭ dankema publiko! Kaj, ho, se la muroj de la plej malnova sukeraĵejo en Miskolc — la „Rorarius”, (por ni nur „Rori”) — povus paroli! — Ĝi povus vere rakonti ne nur pri nia kara Baghy, sed ankaŭ pri aliaj interesaj kaj famaj homoj, kiuj dum la lasta jarcento vizitis la agrablan ejon. Ĝi estis la plej konvena ejo por amika, intima interparolado; la ripozloko por la ĉiamaj ĵurnalistoj, geaktoroj kaj por aliuloj, kiuj ne ŝatas la laŭtan bruon, muzikon. — Do, nia Paĉjo ekamis tuj ĉi „Rori”, kiun ejon verŝajne ankaŭ liaj gepatroj, eĉ geavoj vizitadis, la sukeraĵejon, kies murojn, meblojn vidis antaŭ 120 jaroj nia mondfama poeto Petőfi, kaj ankaŭ nia fama, amata aktorino s-ino Déry.

Ni povas legi en la historio de la Nacia Teatro de Miskolc, ke ĉi tiu teatro estas la plej unua teatro konstruita el ŝtono en Hungario. Ankaŭ la teatra historiisto Sándor Keresztesy rakontas al ni, ke la gepatroj de la patrino de nia Paĉjo en la jaroj 1871—72 rolis ĉi tie, la patrino onklino kune kun sia edzo ĝuste en la naskiĝjaro de Paĉjo (1891) kontraktiĝis ĉi tien. La gepatroj loĝis en Miskolc jam en la jaroj 1904—5 kune kun sia fileto, kiu estis Paĉjo mem. Laŭ la rakonto de Paĉjo, li tie ĉi komencis

„sian seriozan aktoran profesion”, kiel malgranda infano en la speciale hungara dramo „Bánk bán” de J. Katona. La patro estis Bánk mem, la ĉefrolanto, kaj la malgranda Julio ludis en la dramo la filon de Bánk. — Liaj gepatroj kontraktiĝis ankoraŭ plurfoje al la Miskolca teatro, en la jaroj 1899—1900, poste en 1903—4. La patro estiĝis reĝisoro, la patrino sufloristino.

La lastan jaron foje irante al nia Esperanta klubo, mi volis la vojon mallongigi, kaj gvidis Paĉjon tra la korto



Julio Baghy en la korto de la Rákóczi-domo en Miskolc (Sept. 1965)

de malnova domo. Dum la vigla konversacio Paĉjo rigardis ĉirkaŭen, neatendite haltis, eĉ ekkriis: „Kie ni estas?” — „En la korto de la malnova Rákóczi-domo” — mi respondis. La tute kortuŝita Paĉjo nun turniĝis, rondirante ekkriis: „Vidu, tie mi loĝis! Jes, bone mi rememoras, mi vidas antaŭ mi nian loĝejon!” — Mi nur staris silente, kaj imagis knabeton, kiu iam en tiu ĉi korto estis kuradanta, kaj mi ne trovis vortojn por esprimi la belegajn momentojn, eĉ mi ne kuraĝis rompi la emociiĝon de nia kara Paĉjo. — Antaŭ ol ni foriris, mi fotografis Paĉjon rapide, tiel eternigante la neforgeseblajn momentojn. — Do, la rememoro kaj la amo de Miskolc inspiras nian eternan aktoron por viziti la urbon Miskolc.

Márta VÁRI

EL NIA VIVO KAJ KULTURO

En la sudhungarlanda departemento Baranya (kies sidloko estas Pécs), oni resumis la kulturajn rezultatojn de la pasintaj kvin jaroj. Oni konstatis, ke de 1961 ĝis 1965 la nombro de la vilaĝaj kulturdomoj kreskis per 45, do el la proksimume 300 vilaĝ(et)oj de Baranya hodiaŭ jam 286 havas kulturdomon. Ĉiu tria familio posedas televidaparaton, kaj preskaŭ ĉiu familio radioaparaton, abonas aŭ aĉetas gazeton. Dum la kvinjara tempo la loĝantaro aĉetis unu kaj duoble pli da kulturartikloj kaj per triono pli da mebloj, ol dum la antaŭaj kvin jaroj. Ankaŭ la librovendejoj havas ĉiam kreskantan spezon, krome novaj dek miloj enskribiĝis bibliotekon.

La hungaraj ĉasistaj asocioj havas pli ol dudek mil membrojn. La plej multaj el ili estas produktkooperativaj kamparanoj kaj uzinaj laboristoj. La ĉasistoj kunlaboras

ankaŭ en la naturprotektado. Ekz. por savi la sovaĝbestojn dum la frosta vintro, la ĉasistoj havigis nutraĵojn por la bestoj eĉ en la plej malproksimaj regionoj. La Hungara Ĉasista Federacio ankaŭ per modernaj rimedoj plimultigas la bestospecojn, kiuj estas jam en perea stato. Ekz. por la plimultigo de la fazanoj oni organizis plurajn ovomaturigajn terenojn. Tamen — la ĉasistoj ankaŭ ĉasas, komprenoble. Ankaŭ eksterlandaj ĉasistoj akiris multajn valorajn trofeojn en la hungaraj arbaroj.

Pri la familiprojekto faris esplorojn la Hungara Centra Statistika Oficejo. La indikoj — kiuj entenas la duonan procenton de la hungaraj virinoj inter 15 kaj 49 jaroj — evidentiĝis, ke la fekundeco de la edziniĝintaj virinoj en la lastaj jaroj malkreskis jam nur en eta nombro. La esploradoj pruvis, ke 47%-oj de la virinoj jam antaŭ la edziniĝo klopodas elformi sian imagon pri la nombro de siaj naskotaj infanoj. La esploroj konstatis ankaŭ, ke 60%-oj de la edzinoj — kies fizika stato entute ebligis naskon de infano — uzis ian rimedon de la naskiĝreguligo.



Mi ne scias, ĉu Vi jam aŭdis pri „enciklopeditis”? Eble tiuj, kiuj nun aŭdas ĝin unuafoje, pensas, ke al niaj multaj malsanoj akompaniĝis nova epidemio por turmenti la homaron.

Ne. Enciklopedito estas jam tre malnova malsano. Ĝian esencon povas eble plej bone proksimi la vorto: „literotoksiĝo”, kiun kaŭzas precipe la enciklopedioj. La simptomaron de la malsano mi povas plej precize ilustrati per mia propra kazo.

*

Mi estas malnova estimanto de la sciencoj. Hieraŭ mi aĉetis tre saĝan fizikan libron. Hejmenveninte mi elprenis el mia aktuĵo kaj foliumadis ĝin. Mia edzino ekvidis kaj evoluigis inter ni jena dialogo:

— Ĉu denove vi alportis libron? Ĉu ĝi estas almenaŭ bona?

— Tre bona kaj interesa.

— Mi jam nun ridas. Mi jam konas viajn „interesaĵojn”.

— Nu, ĝi estas signifplena verko. „La polarizado de la lumo.”

— Si miris.

— Ho! Vere interesal! Ĉu vere, la poloj jam pasas tiom multajn kosmokraketojn al la Luno?

Nun mi ekmiris.

— Ĉu? ... Kiel? ...

— Nu, por koloniigi la Lunon per poloj oni bezonas mullegajn kosmokraketojn.

Mi ne ridetis. (Hejme mi ne kuragas), nur klarigadis:

— Polarizi estas alia afero, mia Koro. Ĝi signifas: ebenigi la lumvibradon.

— Kiel gladi la lumon?

— Per reflektiloj.

— Si mansvingis:

— Jes. Ĉiaj niaj librobretoj estas plenaj per tiaspecaj prefektilaĵoj.

— Ne prefektilo, mia Koro, sed reflektilo.

— Lasu min! Mi volas diri nur, ke vi plenigas ĉiujn bretojn per tiaspecaj treplektaĵoj, anstataŭ hejmenporti iaspecan valoran libron.

— Kion kompreni sub „valora libro?”

— Tian, kian hieraŭ donis al mi Elza.

— Kaj kia estis tio?

— Ruĝa.

— Ĉu ruĝa? Ĝi vere devas esti tre bela. Kaj la titolon ĉu vi ne malkaŝus?

— Titolo? Mi jam ne memoras, sed en ĝi estas iaspeca „printempo”.

— Kiu verkis?

— Ĉu mi sciu? Mi ne kutimas legi la nomon. Kiome mi fariĝus pli saĝa, se mi ekscias, ke ĝin skribis, — ni supozu, — iu Barnabo de Nepomuk? Min interesas la libro mem.

— Kaj ĉu vi jam legis iom el ĝi?

— Nun mi legas la finon.

— Ĉu jam la finon?

— Ankoraŭ la finon.

— Kial „ankoraŭ”?

— Ĉar la komencon mi jam legis hieraŭ. Nun mi legas la finon kaj morgaŭ mi komencos la mezon.

— Hm. Kaj tiel estas pli oportune?

— Nu, kial ne? Kial mi ekscitiĝu pri la problemo, ĉu Kazimiro povos pardoni al Rozalinda, aŭ ne? Mi preferas ellegas la finon kaj posttagmeze ni trankvile povos iri kun Elza por viziti gesinjorojn Halmi.

— Kie ili loĝas?

— Kiel mi sciu?

— Ĉu vi ne scias, kien vi iros?

— Hodiaŭ ne.

— Kiel kompreni „hodiaŭ ne”?

— Hieraŭ nomiĝis „Kokino-strato”, sed vi scias, ke nuntempe ĉiutage estas rebaptataj kelkaj stratoj. Mi ne komprenas, kial oni ne povas doni konstantajn nomojn al la stratoj. Tiajn nomojn, kiujn oni neniam devos modifi.

— Pri kiaj nomoj vi pensas?

— Ekzemple: „Nuna ministroprezidanto-strato”. Ĉi tiu estus ĉiam aktuala, aŭ: „Feliĉa nuno-placo”, aŭ: „Fineniatingis-kajo”.

— Kaj kie situas tiu Kokino-strato?

— Vidalvide al la Maŭzoleo de Helenaj Artoj.

— Kial „maŭzoleo”? Muzeo, kara, muzeo!

— Ĉu ĝi estas ankaŭ rebaptita?

— Ne, Koreto. La kolektaĵo de artaĵoj ĉiam estis nomita muzeo, sed vi konfuzas kun la vorto maŭzoleo, kiu estas la nomo de tre malnova tomb-

konstruaĵo, en kiu kuŝis reĝo, pri kiu ĝi ricevis la nomon.

— Reĝo? Kiu reĝo?

— Kiu? ... Nu, tion mi jam forgesis. Eble li nomiĝis Maŭzol? Aŭ lia edzino nomiĝis Maŭzola? ... Nome, la edzino konstruigis ... Tuj mi legos en la enciklopedio ...

— Nu, min ne interesas tiu maŭzaĵo. Mi surtabligas la tagmanĝon.

*

Si iris al la kuirejo kaj mi prenis la enciklopedion.

Nu, ni malfermu la literon mol! Mi legas: „Majoliko”, „Makako”, „Makart Hans”.

— Hm! Li estis interesa homo. Famega pentristo en sia epoko.

El la artikolo mi ekscias, ke li vivis en Vieno, furoris, kiel virtuozo de la pompaj koloroj, sed lia valoro tuj post la morto eklipsiĝis.

Sed ho! Ne tion mi serĉis! Sed kion nu? ... Jes! Maŭzoleo!

Mi plusoliumas. Jen, ĉi tie estas: „Makimono”. Ej, kiaspeca mono ĝi estas? Aŭ kimono? Mi legas kaj ekscias, ke ĝi estas japana pentraĵo sur longa silkrubando. Ĉe la fino de la artikolo estas: „vidu: Ĉina kaj japana arto.”

Sed tio estas en alia volumo. Jen, la volumo „Cemento — Dosiero”! Mi malfermas. „Cerealoj, Cervo, Ciklono, Chamberlain”. Ho, li estis angla politikisto, fama pro lia ombrelo. Sed kiom multaj Chamberlain-oj estis! Huston Stewart, Joseph Austen, Neville. Jen, vere li estis Neville!

Sed ni ne disipu la tempon! Kion mi serĉis? ... Jes! Ĉina arto!


Mi foliumas.

Kiaspecaj skaraboj estas ĉi tiuj? Ho, „Cimoj” Jen, tiu estas longa, kiel alumeto kaj tamen ĝi estas cimol! Mi ne scias. „Ĝian ekstermon vidu sub DDT pulvoro” — diras la artikolo. Nu, ni vidu la DDT-on!

Kiom stranga maŝino estas ĉi tiu? Subskribite: „ĉokoladmaŝino”. Interese. Similas al la presmaŝino.

Subite mi aŭdas la voĉon de mia edzino.

— Lasu jam kaj venu manĝi!



— Tuj, Koreto. Unu minuton! — mi respondas.

Nur konfuze briletas en mia kapo, ke mi serĉis ion en la enciklopedio por ŝi. Sed kion? ... Jen! Mi jam scias! DDT! ... Sed tamen nel!

Sed kion do? ... Fine mi rememoras: „Ĉina arto”!

Sed kial ŝi bezonas la ĉinan arton? ... Mi jam scias! Ŝi intencas aĉeti tapiŝon. Versajne tial mi intencis serĉi. Sed kial ĝuste ĉinan tapiŝon? Ni serĉu rekte la titolon „Orientaj tapiŝoj”! Sed jam ni neniokaze flankenvojiĝu kaj perdu la tempon!

Per granda animforto mi foliumas al la titolvorto kaj tie mi legas, ke la persan tapiŝarton ni konas ekde la dinastio „Safida” kaj dum la sekvintaj epokoj influis ĝin multaj eksteraj motivaĵoj, venintaj el Ĉinio kaj el Italio. Mi ekkonas la teksmetodon de la turkaj kaj hindaj tapiŝoj.

Do, ni legu la „Hinda arto”-n!

Mi prenas la volumon „Gurdo — Horacio” kaj sub titolo „Ĝardeno” mi ekscias la diferencon inter la geometria kaj natureca ĝardenoj. Menciita estas la ĝardeno en Versailles. Do, mi pluiras al litero vo, sed ĉe titolo „Varti” min ekkaptas la bildo de renesanca lulilo, do, mi trairas al „Renesanco”. Memkompreneble mi haltas ĉe „Porcelano”, kiu min atentigas pri „Bötger”. Mi reiras al bo, sed sub „Dupont” min surprizas, ke tiun nomon havis

tridekunu famuloj. La dekoka estis mebloplanisto, do, mi trafolumas al „Meblo”, sed ĉe la urboplano de Melbourne mi haltas kaj prenas la unuan volumon por serĉi Aŭstralion. Ĉe „Apsido” mi fariĝas scivolema pri la astronomio, tamen mi stumblas en la vorto „Argano”, ĉe la bildo de altega levmaŝino. Do, mi foliumas al „Ferlatiso”.

Intertempe mallumiĝas, mi intencas bruligi lampon, sed kiam mi ekstaras, ekbriletas en mia cerbo, ke mi per iaspeca celo malfermis la enciklopedion. Pale eĉ lumetas, ke mi intencis ion serĉi al mia edzino, sed mi neniel povas memori, kion.

Eh! Ni lasu! Prefere mi ventolas mian kapon. Mi trairas al la alia ĉambro. Mia edzino jam denove estas hejme kaj ŝi diskutas kun Elza pri la prezaltiĝo de la ovoj. Laŭ Elza ĝin kaŭzas, ke la ovo estas sezona artiklo kaj nun la kokinoj ne ovumas. Sed mia edzino kontraŭdiras, kial do ili tamen ovumas por du forintoj? Sed kiam mi enpaŝas, ŝi rompas la diskuton:

— Nu, vi sentaŭgulo, ĉu vi fine vekigis? Mi ne faras apartan surtabligon! Kiu ne venas ĝustatempe, manĝu nur maŭzoleon!

— Hop! Jen! Do: maŭzoleo! Mi rekuras, malfermas la enciklopedion ĉe litero mo. Eĉ menciis superfluas, ke mi ekhaltas ĉe „Medici”, poste mi tralegas la militiron de Jeanne d'Arc, trakuras la titolvortojn „Kanariaj Insuloj”. Sed ĉe la vorto „Kukurborabotilo” mi jam forte dormemiĝas.

Kioma horo povas esti?

— Kiel do? Nur la dua? Sed jam estas mallume! Kaj la horloĝo funkcias.

Mi ekscias la teruran realon: dua horo post noktmezo!

Rapide enlitigi! Sed kion mi volis serĉi? Lumetas, ke al mia edzino mi intencis ion. Sed kion?

Ne gravas! Morgaŭ mi demandos kaj elserĉos.

Piedpinte mi trapalpas al la dor- moĉambro kaj senvestiĝas. Feliĉe, la stratlampo enĵetas ioman lumeton kaj mi povas eviti, ke mi stumble falu sur ŝin. Eĉ pensi estas terure la rezultojn! Mi eksentas, ke mia kapo turmente doloras kaj eĉ pli kruele mi malsatas. Sed eĉ al la kuirejo mi ne kuraĝas iri. Kion ŝi diros morgaŭ, se ŝi ekvidus, ke mi taŭzacis la manĝaĵon, kiam ni ne kunmanĝis. Malsati estas pli toler- eble.

Fine mi sukcesas enlitigi sen familia katastrofo.

*

Nu, karaj Gesinjoroj, ĉi tio estas la „enciclopeditis”. La kapdoloro kaj akuta malsatsento estas nur akcesoraj simp- tomoj. Krom ĉi tiu la malsanulo per- das la vidon, aŭdon kaj memorkapablon. Li vidas nur la literojn. Kaj por la infekto sufiĉas la enpenetro de unu- sola titolvorto en la cerbon. Tie ĝi tuj komencas multobliĝi per dividiĝo: ĝi naskas du titolvortojn, poste fariĝas kvar, ok, ktp. Laŭ potencprogreso, tute ĝis la kompleta senfortiĝo de la malsanulo.

Ĝi havas unusolan profilaktikan anti- doton: ne rigardu en enciklopedion!

Se vi ion ne konas, tio estas ankoraŭ la malpli granda malbono. Sed se vi malfermas la enciklopedion, vi ekscios, kiel ekstermi la kulojn, kioma Hen- riko aŭ Ludoviko franca reĝo diris, ke „vintre estas malvarme, somere varme”, vi ekscios, kiom semaĵoroj kaj kiom barbiroj troviĝas en Meksikio kaj kiom semaĵoroj havas unu barbiro. Vi ek- konos la edziĝan ceremonion de la Haŭ-Haŭ negrotribo kaj la matema- tikan formulon de la hiperbolo. Ĉion vi ekscios, nur sole unu ne: tion, pro kio vi malfermis la enciklopedion.

Sándor SZATHMÁRI



La desegnaĵoj de Ferenc LAJOS

ENHAVENIĜO

La poeto vekigis bonhumore; oni ĉiam estas bonhumora, se io okazas al oni. Hodiaŭ ekzemple okazas al li, ke la manuskripto de sia plej nova versvolumo li portos al la eldonejo. Je duono post la naŭa li iros al Manjo, kiu promesis por hodiaŭ la zorgan tajpadon de la tuta manuskripto; li prenos sub la akselon la pakaĵon kaj je la deknua li iros al la eldonejo, lin atentos jam la lektoro.

Li sentis iom da tikliĝo en la proksimaĵo de la epigastro, kaj dum li sin razis, ĉiam li meditis pri tio, kial tiom avaras la kalendaro pri la ruĝliteraj festotagoj. Ekzemple ĉi tiu tago estas presita per simplaj nigraj literoj — kvankam en la tuta jaro ne estas festotago pli ruĝe ruĝa. Rilate al ĝi kristnasko estas leporvosto... Oni devus korekti la kalendaron. En ĝi estas skribite: tago de Emőd. Kiel do Emőd? Ĝi ne estas tago de Emőd — ĝi estas Tago de la Manuskripto-Livero!

Pli frue li venis al la eldonejo ol li planis tion. Manjo ne estis hejme, de ŝia patrino li transprenis la manuskripton, en tri ekzempleroj!

Li ŝovis en sian aktujon la tri dosierojn kaj li jam ekkuris; je la duono post la deka li venis antaŭ la domon de la eldonejo. En la angulo de la konstruaĵo invitadis fenestregoj de kafejo; kaj ĉar li havis ankoraŭ iom da tempo, li eniris tra la pivotanta pordo.

Ĉe la unua tablo sidis Holarik kun sia trenaĵo. Amike li balancis la kapon al ili kaj kvitancis la same amikajn rebalancadojn. Ĉe la dua tablo Berente estis la parolgvidanto; kiam li lin ekvidis, li eksaltis, lin brakumis, je du flankoj lin kisis. (La ceterajn li mem batadis dorsen, amikece, tio estis la rangvico.)

— Sidiĝu! — diris Berente entuziasme.

Li levis sian aktujon, lia vizaĝo brilis, kiam li gestis neon.

— Mi sidos aparte. Mi devas ĝin trarigardi... ĝi estas la manuskripto de mia versvolumo.

— Tio estas io alia — spiris Berente. Denove li kisis lin, emociite, kaj li gestis kvazaŭ donante benon.

— Nur iru!

Ĉe la tria tablo sidis la Spányik-kompanio. Deteniĝeme li kapbalancis al ili, sed la plej multaj eĉ ne rimarkis lin. La palpebroj de Spányik ekvibris; se li volis, tion li povis preni ankaŭ por saluto. La Spányik-kompanio lin abomenas, malestimas, malrespektas, li scias tion bone. Laŭ la Spányik-kompanio li estas ne nur sentalenta, ne nur realista, sed li estas eĉ naturalista. Neeble komenci ion pri li.

Li preterpiedis ilin en la maldensiginta, glacia, polusa atmosfero, li iris pli internen. Li mendis kafon, tiris el la aktujo la dosieron de la unua ekzemplero kaj foliumis en ĝi.

Tiam alpaŝis lin Hertelendi, unu el la redaktoroj de la semajna revuo titolita: Krome.

— Ĉu vi havas bonan poemon? — li demandis etendante la manon.

— Nun mi alportos mian novan volumon — li diris signifoplene.

— Nu — alfingeris la libron Hertelendi — do donu ion el ĝi.

— Li ŝovis la manon en la aktujon, malfermis la dosieron de la tria kopio kaj eltiris la lastan paĝon. Tiu ĉi poemo pretiĝis nuntempe kiel granda ĉioresuma ferm-akordo de la volumo. Li multon, tre multon atendas de ĝi: lia koro, sango, animo estas en ĝi.

— Jen — li diris raŭke de ekscitiĝo kaj transdonis la paperon. — Mi kredas, ĝi estas la plej bona, kion mi iam verkis.

— Jes? — demandis Hertelendi kaj li jam ŝovis la manuskripton en sian aktujon. — Dankon. Nu do, kioma estos tiu ĉi volumo?

— La kvina — li diris brilante, poste li demandis, kvazaŭ pretere: Kaj kiam vi aperigos ĝin?

— Eble jam la venontan semajnon — la alia etendis al li la manon. — Ne tro abundas ĉe ni la bonaj poemoj. Nu, adiaŭ!

— Adiaŭ! — li diris varme kaj ekkirlis sian kafon. Lia rigardo aventuris al la tablo de la Spányik-kompanio kaj li meditis pri tio: kion diros la famuloj, la modernuloj, la inicitoj pri tiu ĉi lia poemo?

*

La vendredon de la sekva semajno ekscitite li aĉetis la revuon, kaj kun la flaro de elprovita ĉashundo li ĝin trafolumis. Jes, estas ĉi tie: Nova poemo de Zsolt Barnai. Nu, koncerne tion, oni faris, kiel konvenas. Tiu ĉi Hertelendi — almenaŭ li — tamen scias, kiu li estas! Sed la diablon, kial oni ŝanĝis la titolon? Tion li ne toleros, ke sen lin pridemandi... Nu, ni rigardu!

Li legis jene:

Nova poemo de Zsolt Barnai.



ENHAVO . . .

Ĉiam antaŭen
Ventbatitaj arboj
Neniam en la vivo
Jam sen vi kaj per vi
Aŭroro, vi brila arko
Mi ankaŭ adiaŭas
Jarfina inventaro
Arĝenta krepusko
Pinoj, pinoj, vi abioj
Fine, ankaŭ falinte
Turtoj en la vastaj ĉielo
Jam ĉirkaŭbrakis nin la nokto
Ni iru, ni iru
Prunarbo, sur malnova stepo
Ĉio ĉi tie estas ankoraŭ malmulto
Vesperige
Humilo, mi vokas vin
Senborda krio
Nur nun restu kun mi
Polusstelo de mia sorto, vi fora florkrono
Putorando, orfa melksitelo
Migranto de galaksioj
Lunfingro radia
Sonoru muta muziko
Frostotremanta nokta animo: mia animo
Enhavo . . .

El lia tremanta mano preskaŭ falis la papero; de la gazetvendisto li kuregis rekte al telefonejo en la angulo. Li vokis la redaktoron Hertelendi. Li estis tiom ekscitita, ke apenaŭ li povis paroli. Tuj li volis renkontiĝi kun li, sed la redaktoro hodiaŭ jam ne havas tempon. Bone, tiam morgaŭ, en neŭtrala loko. Por Hertelendi nur la literatura kafejo estas konvena, tie li havas ion fari. Bone, do en la literatura kafejo. Sed akurate!

*

Kun teren fiksitaj okuloj li paŝas tra la pivotanta pordo kaj platan rigardon li ĵetas ĉirkaŭen. Kvazaŭ

li starus sur ferdeko de ŝipo kaj mole, naŭzige luliĝus sub li la maro. Li volus droni; li sentas, ke ĉiuj okuloj estas fiksitaj al li. Sed kion li ja povus fari? Li ja ne povas iri al ĉiu, dirante: pardonu, estis eraro, oni kompostis la enhav-tabelon anstataŭ la „Frostotremanta nokta animo: mia animo” . . . Ke Manjo, kiel brava ŝi estas, ankaŭ nepetite skribis enhav-tabelon, kaj ĝin fiŝkaptis lia blinda fingro el la fino de la dosiero, kiam Hertelendi petis manuskripton kaj li serĉis sian frostotremantan noktan animon . . . Tiun ĉi tutan tragedion povas ripari nur reĝustiga deklaro, en la sekva numero . . . Guste tion li volas preparoli kun Hertelendi, kvankam la afero ankaŭ por ili ne estos agrabla . . . Sed tio estas enda, nepre. Dio mia, kiel malproksime estas ankoraŭ la venonta vendredo!

Li preteriras la unuan tablon. Holárik kapbalancas kiel alifoje: ŝajne li ne legis la poemon. Ĉu eblas, ke tamen ekzistas dio? Berente ne estas ĉi tie . . . Kiel fortune, vi afabla ĉielo!

Li volas sin preterŝteli apud la tria tablo: eĉ la kapon li tiris inter la ŝultrojn. Sed Spányik eksaltas, kiam li lin ekvidas kaj gestas al li kun larĝa rideto:

— Venu, venu! Guste ni parolas pri via poemo! — Li prenas lin je la brako kaj kondukas lin al ilia tablo. Jen, vi vidas, ke vi scias . . . Estas bonega via asociada preteco, ĝuste pri tio ni parolis! Kaj via anim-agorda forto! Atmosfero, atmosfero! Mirkonsterna! — Li lin rigardas, balancas la kapon. — Nur tion mi ne komprenas, kial, je la diablo, vi devis konservativadi dum jaroj? Kiu tiom kapablas . . .

— Serioza! — etendas la manon Smideg. — Kaj moderna, absolute moderna! Subkonscia! Mi nur povas gratuli al vi, kamarado!

Ankaŭ Tutay ridrikanas kun ĝisorela buŝo.

— Jam-jam preskaŭ dudekunua jarcento! Plena trafo! En la muzelon de la oldaj ŝimuloj! Nur pri unu afero vi devas ankoraŭ dekutimiĝi, paĉjo: lasu en la infero la grandajn literojn en la komenco de la verslinioj! Vi ne estas János Arany!

Tradukis: Lajos TÁRKONY

LA VERKARO DE ZAMENHOF

David BUŠS

En julio 1887 eliris el la presejo la unua eldonaĵo, la rusa fundamenta lernolibro. Ĝi titoliĝis: „D-ro Esperanto. Internacia Lingvo. Antaŭparolo kaj Plena Lernolibro (por Rusoj). Varsovio, Tipo-Litografejo de H. Kelter, str. Nowolipie Nr 11 — 1887 —” kun devizo: „Por ke lingvo estu universala, ne sufiĉas nomi ĝin tia.”

Saman jaron D-ro Zamenhof eldonis ankaŭ polan, francan, anglan kaj germanan tradukon de tiu unua broŝuro, ĉiam laŭ la sama plano: Antaŭparolo; alfabeto de la Lingvo Internacia; dek ses gramatikaj kaj sintaksaj reguloj; kelkaj Esperantaj tekstoj: Patro Nia, El Biblio, Modelo de Letero, poemo „Mia Penso”, traduko el Heine, poemo „Ho mia Kor’”; vortaro internacia—nacia.

La *Fundamento de Esperanto* aperis en 1905, kaj havas jenajn tri ĉefajn partojn: 1. La 16-regula gramatiko; — 2. la Universala Vortaro; kaj 3. la Ekzercaro.

La unua verko, tradukita de Zamenhof estas *La Batalo de l'vivo*, rakonto de Dickens. La traduko aperis la unuan fojon en 1891 en „La Esperantisto”.

Zamenhof elpaŝis per siaj oficialaj paroloj laŭvice en la unuaj ok Universalaj Kongresoj. Ĉiuj liaj paroloj estas tre signifoplenaj en la historio de la Esperanto-Movado. Laŭ mia opinio la plej gravaj estis liaj paroloj en la unua kongreso en 1905 en Boulogne-sur-Mer kaj en la tria kongreso en 1907 en Cambridge. Sendube sub influo de la Zamenhofa parolo la fama profesoro de la Cambridge universitato d-ro J. E. B. Mayor rekonis la valoron de Esperanto kaj proponis lerni la lingvon en lernejoj kiel unuan post la gepatra lingvo.

La unua eldono de *Fundamenta Krestomatia* aperis en 1903 en Varsovio. D-ro Zamenhof kompilis ĝin, por ke ĉiuj esperantistoj havu modelon de stilo. En 1907 aperis la kvina eldono de *Fundamenta Krestomatia* kaj en la Antaŭparolo al tiu eldono Zamenhof diris, ke li trarigardis la *Krestomatia* kaj trovis diversajn esprimojn, kiuj jam ne plaĉas al li, kaj kiujn li volonte ŝanĝis. Tamen li ne ŝanĝis ilin, ĉar li decidis, ke por verko, kiu celas subtenadi unuformecon, severa konstanteco estas multe pli grava, ol

plena perfekteco. La 17-an eldonon, kiu aperis en Anglujo en 1954, el lingva vidpunkto redaktadis akademianoj F. A. F. Faulhaber kaj W. J. Downes, akomodante la lingvon al stilo de Zamenhof, kian la majstro uzadis en la lastaj jaroj de sia vivo, kiam lia esprimaro estis plene elformiganta kaj maturiganta.

La libro *Proverbaro Esperanta* la unuan fojon aperis en 1905 kiel suplemento al libro sub jena titolo: „Frazologio rusa — pola — franca — germana de M. F. Zamenhof. Kaj. I. Varsovio 1905.” — Kvankam ĉi tiu verko aperis nur sub nomo de la patro de Zamenhof, tamen la Esperanta parto estas verko de nia majstro. — „Kiam Ludoviko iomete pliaĝiĝis, li helpadis multege al la patro en la Proverbaro. Sciante, kiom malmulte profitodonaj estas la Esperantaj verkoj kaj ne volonte ĉagrenigi la patron, li rezignis je la esperanta eldono de l' Proverbaro, malgraŭ tio, ke li mem ĝin jam estis plene tradukinta. Tamen sekrete li traktis kun Berlina firmo pri eldono del' Esperanta traduko. Kaj kiel grandega estis lia feliĉo, kiam li povis foje veni al la patro kun la ĝojiga komuniko, ke oni el Berlino sendis honorarion por l's Proverbaro kaj ke baldaŭ ĝi aperos en la Esperanta traduko. Tie ĉi ni volas kun rezervo noti, ke estas sekretakontoj, ke... la monon Ludoviko pagis al la patro el sia propra poŝo”. (Wiesefeld: *Galerio de Zamenhofoj*, 1924.)

En la traktato *Esenco kaj estonteco de la Ideo de Lingvo Internacia* Zamenhof per pluraj ekzemploj, interesaj komparoj kaj logika klareco pruvas ke 1. La enkonduko de Lingvo Internacia alportus al la homaro grandegan utilon. — 2. La enkonduko de L. I. pli aŭ malpli frue nepre kaj sendube efektiviĝos, kiom ajn la rutinistoj batalus kontraŭ tio ĉi. — 3. La enkonduko de L. I. estas tute ebla. — 4. Kiel internacia neniam estos elektita ia alia lingvo krom arta. — 5. Kiel internacia neniam estos elektita ia alia lingvo krom Esperanto; ĝi aŭ estos lasita por ĉiam en la nuna formo, aŭ en ĝi estos poste faritaj iaj ŝanĝoj.

La plej ampleksa tradukita verko de Zamenhof estas la *Malnova Testamento* (Biblio).

Zamenhof tradukis ĉiujn fabelojn de *H. C. Andersen*, kiu apartenas al la plej klarvidaj, plej klarmensaj verkistoj de la homaro. La kvar volumoj ampleksas kune 699 paĝojn. Zamenhof tradukis la tragedion de *Shakespeare: Hamleto*, reĝido de Danujo. La traduko aperis en la kriza jaro de la „voĉdonado” en 1894. La 5-a eldono aperis en 1909. Ĝi estas la plej profunda kaj pensoriĉa dramo de Shakespeare. En 1908 la majstro tradukis *Georgo Dandin*, komedion de *Molière*, el la franca lingvo.

La *du unuajn originalajn poemojn* de Zamenhof ni trovas en la Unua Libro kiel specimenojn. Ili estas „Mia penso” kaj „Ho, mia kor’”. — „Mia penso” estas kvarstrofa poemo en kvartrokeoj; ĝi fluas melodie, agrable; kaj se la rimoj (laŭ sistemo ababcded) nuntempe ŝajnas iom banalaj, siatempe ili ne estis tiaj. La poemo rakontas, kiel junulo aŭdas amikinon kanti pri espero. La poemo finiĝas per sopiro al morto en espero, se la laboro ne povas sukcesii.

Tiu ĉi unua Esperanta poemo, kvankam teknike adekvata, ne estas granda poemo; ĝi gravas pli kiel pionira verko ol kiel artaĵo. La alia originala poemo „Ho, mia kor’” en la Unua Libro estas teknike pli matura kaj kontentiga:

Ho, mia kor’! Post longa laborado
Ĉu mi ne venkos en decida hor’!
Sufiĉe! Trankviliĝu de l' batado,
Ho, mia kor’!

Tiu ĉi poemo eble ankaŭ portas iomete de la mistera profetemo de la organika sinkromprenado, de la subkonscia menso: Zamenhof, dum granda parto de la vivo, multe suferis pro grava kormalsano.

Zamenhof verkis dum la restanta vivo nur sep aliajn poemojn.

„La Espero” estas poemo, tristrofa, okversa, kvintrokea, kun rimsistemo ababcded, pri la interpaciga celo de Esperanto. Kun la simple impona melodio de Mènil, ĝi estas la tradicia Himno de la Esperanto-Movado.

„La vojo”, ankaŭ ofte kantata, estas pli melodia; ritme kaj forme ĝi estas pli subtila, ĝi estas kuraĝiga poemo por iu ajn, kiu laboras por celo ankoraŭ minoritata.

Zamenhof verŝajne ŝatis amfibrakojn, ĉar li uzis ilin duan fojon en sia poemo „Preĝo sub la verda standardo”, idee lia plej profunda poemo. En tiu sesstrofa poemo Zamenhof esprimas siajn ideojn pri mondreligio kaj preĝas al la Dio de la tuta homaro, promesante labori por tiu celo. Ankaŭ teknike tiu poemo estas inter la plej bonaj, kiujn Zamenhof verkis.

„Al la Fratoj”, kiu aperis en 1889, estas la plej longa poemo de Zamenhof.

La lasta konata poemo de Zamenhof estas „Pluvo”.

Ĝi aperis unue en 1909, kiam Esperanto jam disvastiĝis kaj per kelkaj internaciaj kongresoj jam plene pruvis sian vivkapablon.

La unuaj poemoj de Zamenhof fontis el personaj emocioj; sekvis epoko de malfacila organizado kaj propagando, dum kiu la lingvokreinto ne havis tempon por poluri sian nepre ekzistantan poezian talenton.

Tamen Esperanto mem estas la ĉefa poemo de la mondpoeto Zamenhof.

La originalan verkaron de Zamenhof kolektis kaj ordigis *d-ro Joh. Dietterle*, eldonis la firmo Ferdinand Hirt und Sohn en Leipzig en 1929. En la 604-paĝa granda libro troviĝas artikoloj, paroladoj, leteroj kaj poemoj de la majstro. La artikoloj estas ordigitaj en tri partoj: 1. Antaŭparoloj al lernolibroj kaj aliaj verkoj. — 2. Gazetartikoloj, kiujn Zamenhof skribis kaj kiel aŭtoro de la lingvo kaj kiel redaktanto de la unua esperantista gazeto. — 3. Traktaĵoj pri specialaj temoj, kiuj ne rekte rilatas Esperanton. — La tri aliaj partoj enhavas paroladojn, leterojn kaj poemojn.

Grandega estas la literatura signifo de la majstro. — „Esperanto povas servi kiel lingvo por libera esprimado de ĉiuj geniaj verkoj de la homa literaturo” — diris Zamenhof, kaj li mem kontribuis al la riĉigado de la vortaro pri la neceso redoni kelkfoje subtilajn ideonuancojn de la beletraj ĉefverkoj. Oni ne troiĝas la rolon de la Zamenhofaj tradukoj dirante, ke sen ili Esperanto ne vere ekzistus, ĝi estus pala teoria fantomo, kiel estis aliaj projektoj. Per siaj gramatikaj kaj leksikonaj verkoj, Zamenhof estis konstruinta la skeleton de la lingvo; per sia persista tradukado kaj originala verkado, li vestis tiun ostaron per sukplena, sangriĉa karno. La animon oni serĉu cetere en liaj originalaĵoj.

Biografion pri Zamenhof verkis: Edmond Privat, Edvardo Wiesefeld, Maria Ziolkowska (franca, Esperanta kaj pola), Ismael Gomes Braga (portugala), Marjorie Boulton (angla kaj Esperanta), A. Lopez Luna (hispana), Waringhien (Leteroj de Zamenhof).

La poezia verko de Edmond Privat detale kaj kun amo priskribas la plej gravajn momentojn el la vivo kaj agado de Zamenhof. Antaŭ niaj okuloj kiel sur ekrano pasas unu neordinara vivo, plene dediĉita al la granda ideo pri paco kaj harmonia vivo inter ĉiuj popoloj de la mondo.

Jen estas la kvinjara knabo, scipovanta kvin lingvojn: polan, rusan, bjelorusan, judan kaj germanan — kiu ŝatas vagi tra la bazarplaco de Bjalistoko. Tie ĉi li ricevas la unuajn impresojn pri la vivo kaj spertas la malamon inter la homoj, kaŭzitan ĉefe aŭ parte de ilia diverslingveco; jen dekjara verkanto de naiva tragedio pri temo prenita el la Biblio: la Babela turo; jen gimnazia lernanto en Varsovio jam kun klara kaj firma programo pri la destino de sia vivo — krei internacian lingvon. Tiu ĉi programo fariĝos revo kaj enhavo de lia vivo; jen studento de medicino en Moskvo kaj Varsovio, kiu, krom pri medicino, persiste kaj inspirite okupiĝas pri sia amata *lingve universala*; jen venkinto kun nova celo — fari la internacian lingvon lingvo de milionoj; jen fama homo glorata kaj admirata de niloj da adeptoj de la ideo pri paco kaj kompreniĝo inter ĉiuj popoloj.

Paralele ni ekkonas la „alian” Zamenhof — la filon, la fraton, la edzon kaj la bonan okuliston — amikon de la malriĉuloj.

Noto de la red. S-ano David Buŝs (Majori, Sovet-Latvio) ricevis per tiu ĉi traktaĵo la unuan premion, en nia konkurso anoncita ankoraŭ en la 1964/4 n-ro de Hungara Vivo. Kiel premion ni sendigas al s-ano Buŝs dum kvin jaroj senpage nian revuon.



Tibor BARABÁS

LA INFANOJ DE SARASTRO

Nun mi vidas denove antaŭ mi tiun knabeton de la Hunyadi-placo, kiu ĉiam malsate kaj ĉiam en eluzitaj vestoj tie staraĉis dum someraj vesperoj antaŭ la Industria Halo kaj aŭskultadis la publikajn koncertojn de la Ĉefurba Orkestro. Foje, post posttagmezo lacigita de piedpilkludado, aŭdiĝis muziko el la direkto de la kaŝtana arbgrupo (nun mi jam scias, ĝi estis la uverturo de Vilhelmo Tell), kaj mi iris en la direkto de la sonoj, kvazaŭ ia sorĉo min tirus tien. En la violaj briloj de la vesperiĝo brilis


blovinstrumentoj, trumpetoj kaj ankaŭ sur la malhelaj aldviolonoj ekbriletis io. Anstataŭ la sovaĝaj krioj de la ludplaco min akceptis solena silento, poste denove eksonis la muziko, nun mi jam scias, ĝi estis la skota simfonio de Mendelssohn... Ĉar pro tiu ĉi renkontiĝo mi forlasis la Kaŝtanejon, kaj la Arbrondon, mi enŝoviĝis al la ronda estrado, tute al la kolonoj kaj mi klaŭskultis ĉiujn koncertojn de Dezső Bor. Kiam li eksignis per sia bastoneto kaj eksonis la muziko, mi eniris en ian mondon krepuske sentatan, kiu plenigis la koron kaj etendis la imagon... Mi atingis en strangan, senliman landon, en la patrujon de neniam viditaj pejzaĝoj kaj neniam aŭditaj sonoj, kie ĉio estis bela kaj ĉio estis vera. Kaj la simfonioj, la uverturoj kaj la simfoniaj poemoj vekis en mi strangajn, varmegajn sentojn kaj tiuj instigis min,

ke mi skribu poemojn. En iu el inter la unuaj mi serĉis la ĉhon de la V-a Simfonio, — balbutante, senrime, kun mallerta senformaĵo, sed mi tamen divenis en ĝi la artan sorton potence sonantan: la ĉiam duran, sed neniam senesperan duelon de la Sorto kaj de la homo...

Mi estis tiam jam dekdujara, sed ankoraŭ ĉiam malsata kaj ankoraŭ ĉiam ĉifona... Ĉio ĉi venis en mian memoron ĉe la infan-koncerto de la Muzikakademio. Eble tial kondukis min tien mia vojo, ke mi denove povu taksi la ŝanĝon de nia vivo...

*

El la loĝio de la Muzikakademio oni povas bone vidi la tutan spektatorejon, la parteron kaj ankaŭ la galerion. Alifoje la spektatorejo estas malhela kaj solena pro la vestoj de la publiko, sed nun ĝi aspektas kiel floranta kampo, nura bluo, ruĝo kaj verdo. La vicajn plenigas ok-dek-dekdu-jaraj knabinoj kaj knaboj... Aŭskultantoj de la Rondo de Junaj Muzikamiko el la Ĝenerala Lernejo. La kvikanta babilado subite ekmutas. Antaŭ la infanoj nun ekstarras László Lukin kaj liajn vortojn akceptas tiu malnova memorinda silento, kiu rajte aldecas la majstrojn de la muziko. Li parolas pri Mozart, pri la Salzburga knabeto, kies patro estis muzikisto de la Katedralo, ribeliĝinta subulo de la princo-ĉefepiskopo Colloredo Hieronymus kaj vestita en ties uniformo... Pri la infano Mozart parolis László Lukin tiel simple, saĝe, sen ia ajn moŝteco, ke mi sentis la enfermitan kurentcirkon de la naskiĝinta kontakto... Kion li diris, estis kiel artista legendo, tiel ekscita, neatendita kaj transpasanta ĉian imagon kaj tamen tiel vera kaj simpla, kiel la serioza apologo, kiu parolas jene al la infanoj: vidu, kiom multe povas fari infano, se li sentas la belecon de la vivo kaj se lin benis la naturo per la arto de la esprimkapablo. La preleganto aperigis la infanon, sur kies unuajn muziknotojn falis la plorgutoj de la emociiĝinta patro. La knabeton, kiu en Romo, en



la kapelo Sixtus elaŝkultis la grandfastan koncerton de la papa kantohoro kaj poste li priskribis el memoro ĉiujn tonojn de la meso, senerare.

Mi neniam forgesos tiujn okulojn ekbrilantajn el la partero, tiujn duone malfermitajn mirantajn buŝojn. Mi vidis, mi sentis, ke ĉiu memoranta, reaperiganta kaj klariganta vorto de László Lukin tuŝis iliajn animojn... Kaj eĉ pli, kiam je la signo de la muzikestro Miklós Erdélyi el la muzikiloj de la Simfonia Orkestro KISZ eksonis la Eta Nokta Muziko... Antaŭ la muziknotoj sidis iamaj aŭ nunaj lernantoj de la Muzikakademio, junaj lernantoj de la muziklernejoj. Per kiom da elano, per kia freŝa pieco de la muziko ili eksonigis la harmonian artverkon de Mozart. La preleganto gvidas nun siajn etajn aŭskultantojn sur opercenejoj de Vieno kaj Praha. Ja ili lernu, kiel naskiĝis el la revoj, senluziigoj kaj espero de Mozart la *Così fan tutte*, *Fuĝigo* el la serajlo, *Edziĝo* de Figaro, *Don Juan* kaj *Sorĉofluto*... Kaj kiam László Lukin atingas la lastnomitan, li klinas sian kapon antaŭ la memoro de la plej granda hungara Sarastro...

„Miaj karaj etaj geamikoj — diras Lukin — nun oni inaŭguris en la tombejo la tombmonumenton de la granda hungara artkantisto Mihály Székely. Lin la skulptisto prezentas kiel Sarastro kaj rajte, ĉar Sarastro de la *Sorĉofluto* estas la spirito de la pardono kaj de la boneco... Nun aŭskultu la E-maĵoran arion de Sarastro...” Sur la vizaĝo de Miklós Erdélyi ekradias la solena sento de la ario kaj eksonas la majesta ario de Sarastro pri la bono kaj pri la vero...

Kun kia sindona seriozeco komandas nun la muzikestro kaj kantas Sándor Mészáros. Kiom da sentoj veikiĝas en la etaj koroj pro la opero de

Mozart. Maria Werner kantas la koloratur-arion de la „*Regino de la Nokto*”, pure kaj sonore, sentigante la potencon de la malbono atingante la malvarmajn astrojn... Nun Árpád Kishegyi ekstaras antaŭ la aplaudanta publiko. Per li paŝas sur la scenejon Papageno, la homo de la vivo kaj de la humuro. Kishegyi ludas eĉ sen kulisoj kaj kostumo, disradiante ĉirkaŭ si per la melodio kaj teksto de la F-maĵora ario serenon kaj facilflugan vitalecon:

*Necesus vigla, arda
knabino, freŝa flor',
sed taŭgus eĉ hazarda
virin' kun flama kor'.*

Kaj eĉ pli, kiam Kishegyi kantas kun Edina Pavlánszky la duon de Papageno kaj Papagena, kiel muĝadas la infanaro! Kaj kiam Papageno kisas Papagenan, tondre aplaudante salutas ilian feliĉan amon tiuj, kies eta koro ankoraŭ eĉ ne burĝonas...

La Mozart-parto finiĝis, nun sekvas la majstraĵoj de Beethoven. Miklós Erdélyi, la orkestrestro levas la bastoneton, streĉa atmosfero plenigas la publikon, la orkestron. Kaj mi, vidante la nunajn infan-aŭskultantojn de Beethoven, rememoras iun leteron de li, kies historion — kvazaŭ la ideon de tiu ĉi bela vespero — jen mi aldonas.

Okazis iam, ke okjara malriĉsorta knabineto — infanmuzikistino — skribis adoran leteron al Beethoven kaj kunsendis donace ankaŭ papermonujon membroditan. Beethoven la 7-an de Julio 1812 jene respondis al la letero de la infano:

Mia kara bona Emilia, mia kara amikino! Nur malfrue mi respondas al via letero: servu por mia pardono miaj diversaferaj farotaĵoj kaj mia daŭra

malsanado... Sed ne forŝiru de sur la frunto de Händel, Haydn, Mozart la laŭron — al ili ĝi decas, al mi ankoraŭ ne.

Vian uĵeton mi metas al tiuj miaj memoraĵoj, per kiuj min kelkaj el miaj bonaj amikoj ankoraŭ ne sufiĉe merite surprizis. Klopodu ankaŭ estonte kaj ne nur ekzercu la arton, sed ankaŭ penetru en ĝian esencon, ĝi meritas tion, ĉar nur la arto kaj la scienco levas la homon ĝis la dieco!

La vera artisto ne povas esti fiera, li ja devas dolorsente sperti, ke la arto ne havas limon. Li sentas malklare tion, ke li estas ankoraŭ malproksime de la celo kaj dum lin aliaj eble jam admiras, li mem ĉagreniĝas pro tio, ke li ankoraŭ ne atingis tion, kien lia genio — kiel malproksima suno — jam antaŭen lumas.

Mi eble preferus viziti vin kaj viajn karajn, ol multajn riĉulojn, de sur kies vizaĝo vidiĝas la spirita malriĉo... Mi ne konas alian signon de la homa eminenteco, nur tion, kio envicigas la homon inter la pli bonajn kaj tie, kie mi trovas tiujn pli bonajn, estas mia patrujo. Mi fariĝis via fidelulo kaj la amiko de via familio.

Ludwig van Beethoven

Mi elpaŝis tra la pordego de la Muzikakademio. Estis mornega vetero. La neĝo falis, la stratojn baris grandaj neĝmontetoj kaj mi tamen pensis nur pri la kantantaj kaj muzikantaj infanoj kaj mallaŭte zumkantis la arion de Sarastro:

*„Ne vivas venĝo krima
en jena sankta hal'
En pura sent' intima
silentas la batal'.”*

El la hungara: P. BALKÁNYI

EL NIA VIVO KAJ KULTURO

La Akvo kaj la Homo en Hungarlando — jen estas la titolo de 48-paĝa, bele ilustrita libro, kiun kompilis Iván Wisnovszky kaj Endre Almássy, ĝia faka lektoro estis Dénes Bözsöny, ĝin esperantigis Ottó Haszpra kaj lektoris Tibor Ujlaky-Nagy. La valoran verkon eldonis VITUKI, Kontoro por Akvoafera Teknika Informado, kaj ĝin ricevis senpage ĉiuj membroj de la 51-a Universala Kongreso en Budapeŝto. Ĉar rivero, reguligo de akvoj kaj bedaŭrinde foje-foje ankaŭ inundo troviĝas en ĉiuj landoj, la bonega libro estas tre instrua ankaŭ por la eksterlandaj fakuloj, eĉ por ĉiuj laikuloj. Ni esprimas nian dankon kaj gratulon al VITUKI. Ĝi meritas la sinceran rekonon ankaŭ de ĉiuj kongresanoj. Do estas motivita nia deziro: kiuj jam tra legis la verkon, bonvolu nepre skribi al VITUKI, Budapest, VIII. Rákóczi út 41.

Ankaŭ numeron de nia Hungara Vivo ricevis senpage ĉiuj niaj kongresanoj. Ni esperas, ke multaj — kiuj ankoraŭ ne konis nian revuon — legis kun interesiĝo la ricevitan numeron. La jaro 1967 alportu la pliiĝon de niaj abonantoj. Ĉiu hungara esperantisto abonnu nian belan revuon, kaj krom tio kiel eble plej multaj abonnu la revuon ankaŭ por siaj eksterlandaj geamikoj. Hungara Vivo devas esti kiel eble plej baldaŭ dumonata, poste monata organo, kaj ni petas la bonvolan helpon de ĉiuj gesamideanoj, por la plua evoluigo de nia revuo.

KORESPONDI DEZIRAS

Prof. Benedicto Silva, Rua Duque de Caxias, 96, MONTE APRAZIVEL, SP, Brazilo, kor. kun hungaroj precipe pri lingvoj (se eble Latina kaj romanidaj), literaturo kaj folkloro.

Jerzy Czeremaga, ul. Jas. Dolina 26 6/2, SD. WRESZ, Pollando. 16-jara lernantino kor. pri muziko, sporto, historio, geografio, filmo. Interŝanĝas PM, fotojn de aktoroj, gramofondiskojn.

Nadija Andrianova, Sovet-Ukrainio, KIEV—59, Artema 51/9. kor. kun hungaroj. Laŭprofesie ŝi estas tradukisto el la rusa, franca, germana kaj angla lingvoj en la ukrainan lingvon. Krome ŝi estas kritikisto.

Jurij Moiseev, Fediko 5/2 kv. 123. KIŜINEV, Moldavio, USSR, kolektas fotobildkartojn de filmaktoroj kaj de kosmonaŭtoj.

Jan Vedevik, Poste Restante, Huvudpostkontoret, GÖTEBORG I. Svedio, 50-jara laboristo kor. pri ĉiuj temoj.

Lidia Trzeiniska, ul. Lagieroniki 64/17 A, GDANSK, Pollando. 16-jara lernantino kor. pri geografio, filmo, sporto. Int. BK, PM, fotojn de aktoroj.

V. Šlevas, Rajono Taurage, Poŝto ADAKAVAS, Sovet-Litovio, kor. kun seriozaj amikoj.

Jaroslav Koktán, 155, okr. Pelhrimov. ŽELIV, Ĉeĥoslovakio. Kor. kun hungaroj bone parolantaj E-n.

LA MONDFAMO

KAJ — MI

— Mia mallaŭta babilado kun G. B. Shaw —

Nun, kiam George Bernard Shaw fariĝis denove unu el niaj plej sukcesaj hungaraj dramistoj, mi rememoris pri mia unua ekscita renkontiĝo kun la mondfama verkisto.

La 20-an de marto 1940 en Londono telefone mi alvokis G. B. Shaw. Ni ne havis komunan konatulton, tamen mi deziris konatiĝi kun li. Serĉadante en la telefonlibro alian nomon, mire mi vidis, ke jen lia nomo estas en la libro. Kvankam mi sciis, ke en Londono eĉ enpagon ne akceptas la banko sen rekomenda letero, tamen mi riskis tiun ĉi telefonparolon.

Anoncis sin vira voĉo:

— Halo...

— Halo... Mi ŝatus paroli kun la sekretariino de Bernard Shaw.

— Parolas Bernard Shaw... Sed kion ajn Vi volus sciigi por mia sekretariino, mi volonte transdonos ĝin.

— Mi dankas. Ĝuste kun Vi mi volis paroli.

— Kiu parolas tie?

— Paul King (tio estis mia angla nomo, ĉar tia anglo ankoraŭ ne naskiĝis, kiu mian veran hungaran nomon povus elparoli), mi estas mondfama hungara verkisto — mi modestadis — kaj mi supozis, estus bone, se ni interkonatiĝus.

— Ĝis nun mi ankoraŭ ne aŭdis tiun ĉi nomon. Bedaŭrinde iomete mi estas malklera. Pri kiu afero Vi deziras kun mi paroli?

— Mi havas nenian aferon kun Vi. Mi nur pensis, ke ni devus interkonatiĝi.

— Nenia malhelpo.

— Kiam mi povus Vin vidi?

— Nun.

Mi surpriziĝis. Mi vivis en Londono de du jaroj, kaj mi sciis, ke eĉ la plej simplan homon, en kia ajn grava afero, oni povas viziti nur post semajnoj, eventuale post monatoj, eĉ tiam, se mi ŝuldus al li per mono kaj mi volus pagi.

— Mi dankas. Mi estas tuj ekironta.

Mi demetis la telefonaŭdilon kaj post du minutoj la taksio kuregis al la loĝejo de Shaw.

Mi sonorilis sub la olda domo n-ro Gramercy Park 5, kaj konsterniĝis, kiam Shaw mem malfermis la pordon.

— Mi estas Paul King, kiu telefonis al Vi.

G. B. Shaw rigardis min de nezurebla alteco. Li estis almenaŭ du metrojn alta; mi sentis, ke mi atingas lin nur ĝis la maleolo.

— Jes ja, kion Vi diras, el kiu nacio Vi estas?

— Mi estas hungaro.

— Interese. Ĉu la hungaroj estas tiel etaj?

— Kiel? Ĉu la angloj ĉiuj havos tiel blankan barbon?

— Envenu. Tion ni devas preparoli.

Mi enpaŝis. El la senmebla antaŭĉambro la verkisto kondukis min en la bibliotekĉambro, kie krom kelkaj mebloj, komfortaj ledbrakseĝoj kaj pli aĝa skribotablo peziĝis sur min ŝarĝo de milionoj da libroj. En la ĉambrego ĉirkaŭe de la planko ĝis la plafono estis ĉie-ĉie libroj. Krome arego da fotoj pri G. B. Shaw. Fotografajoj junaĝaj, sur kiuj li ŝajnis pli aĝa ol en sia maljunaĝo.

— Ne ektimiĝu, juna amiko — diris Shaw — preskaŭ ĉiuj libroj ĉi tie estas miaj propraj verkoj. Mi jam diris, ke mi estas ne tro klera. Ja eĉ tiujn librojn mi ne kapablas legi. Rigardu tien!

Li elprenis unu el la libroamasego. Li malfermis la libron, sed eĉ la titolon mi ne kapablis legi. Ĝi ŝajnis esti araba aŭ hinda libro. Sed eble ĝi estis tute alia.

— Kiulingva estas tiu ĉi eldono? — mi interesiĝis ĝentile.

— Mi ne scias. Mi komprenas nur la anglan kaj la iran lingvojn, kio estas la sama. Sed mi ŝatas tiujn ĉi librojn en nekonataj lingvoj. Eĉ se mi nenion komprenas el ili, la libroj certe estas bonaj, ja mi mem verkis ilin. Se mi rigardadas tiujn ĉi librojn, mi sentas min tre saĝa. Tiel povas senti sin miaj anglaj legantoj, se ili provas kompreni la anglan eldonon de iu Shaw-libro.

Li proponis al mi cigaredon, kaj dume li apogis sin dorse en la ledbrakseĝo.

— Kial vi ne ŝatas la anglojn? — mi interesiĝis.

— Ĉar mi estas irlandano. La angloj subpremas ilin. Sed eĉ tiam mi ne ŝatus ilin, se mi estus anglo, ĉar mi malamas la subpremon. Estas nedece insulti tiel simpatian minoritaton, kiel la irlandanoj estas. Sed eĉ tiam mi kolerus je ili, se ili persekutus loĝantojn, kies nomo komenciĝas per la litero S. Subpremanta popolo emas etendi la tiranecon eĉ sur sin mem. Tial mi diras, ke la angloj nun ĝemas sub angla okupado.

Dum la babilado ĉambristo kun blanka ganto servis per „high tea” („ĉefa teo”), kio signifas, ke al la teo oni servas ankaŭ ŝinkon, kolbason, fromaĝon, bakaĵon ktp.

Mire mi rigardis Shaw, manĝanta bonapetite el la ŝinko. Li ŝajnis esti maljunega. Milionoj da sulkoj plugis liajn vangojn. Lia barbo estis neĝoblanka. Nur liaj bluj okuloj briletis junece. Li estas nekredible maldika. Estas mirakle, ke li „konserviĝis”

dum okdek jaroj. (Tiam li estis nur okdek.)

— Pardonu, s-ro Shaw, sed la tuta mondo klaĉas, ke vi estas vegetarano.

— Kaj do?

— Jes, vi manĝas nun ŝinkon. Ĉe ni en Hungario la ŝinkon oni konsideras viando.

G. B. Shaw kuntiris siajn brovojn.

— Ĉu Vi estas viandomanĝanto?

— Jes ja.

— Nu vidu! Mi mem estas vegetaĵmanĝanto, sed mi ne estas fanatikulo ĉirilate. Mi manĝas ankaŭ viandon, se mi ekdeziras ĝin. La sekreto de la longa vivo estas: oni devas vivi longe. Sed tion Vi ne distrumpetu. La vegetaĵmanĝantoj nur kredu, ke pro tio mi vivis tiel longe, kaj ili miradu, se ili mortos en kvardekjara aĝo, kune kun la vegetaĵo.

— Ankaŭ alian klaĉaĵon mi aŭdis pri Vi.

— Do ĉu oni parolas ankoraŭ pri mi? Mi ĝojas pri tio. Kion Vi aŭdis?

— Ke la Londona eldonisto de Ferenc Molnár petis Vin, skribi antaŭparolon al la nova libro de Molnár, la verkisto. Oni diras, ke Vi rifuĝis ĉi peton.

— Jes, prave.

— Kial?

— Ĉar ankaŭ mi ne petis s-ron Molnár, ke li skribu antaŭparolon al miaj libroj aperintaj en hungara lingvo. Pri tio eĉ paroli ne indas, ke ĉe mi antaŭparoleto povus okupi eĉ 300 paĝojn. Do tiel la verko de Molnár ne havus lokon apud mia antaŭparolo. Li danku tion al mi.

— Ĉu estas vere, ke vi juĝas Vin mem plej eminenta verkisto de la mondo?

— Estas vere. Sed la mondo estas tiel eta! Estas mirinde, kiel disiras la klaĉado. Ĉu jam eĉ tion oni scias pri mi? Kaj kiun Vi mem juĝas la plej eminenta verkisto de la mondo?

— Min mem — mi modestadis.

Shaw ekridetis:

— Povas esti, ke ni ambaŭ pravas — escepte Vin.

— Mi pensis tion ne serioze. Sed: se ni jam estas ĉe tiu temo, la plej eminenta verkisto laŭ mi estas Frigyes Karinthy.

— Ĉu ankaŭ li estas hungaro?

— Jes.

— Diru ion el lia verko.

— Longe mi parolis pri Karinthy, poste detale mi rakontis la enhavon de mia favorata dramo: „Holnap reggel”. (Morgaŭ matene.)

Shaw estis ravita:

— Ĉu certas, ke tiun ĉi dramon ne mi verkis?

— Jes: la verkisto estas Karinthy.

— Domaĝe. Ankaŭ mi estus povinta ĝin verki.

— Mi tre dankas tiun ĉi ĉarman posttagmezon. Vere mi havis nenian aferon kun Vi, sed ni aranĝis ĉion.

— Jes. Hodiaŭ ni faris multe. Mi dankas. Mi havas la honoron.

(Világ Ifjúsága — Junularo de l' Mondo)

El la hungara: Ludoviko KÖKÉNY



La 10-a Infana Kongreseto

La aŭtobuso suprengrimis sur vojo borderita per ĝardenoj kaj vilaoj. Subite la pejzaĝo malfermiĝas kaj aperas antaŭ ni sub arbaraj montoj agrablaj konstruaĵoj ornamitaj per verdstela standardo kaj kun surskribo: „10-a Universala Esperanto-Kongreseto”. Ĉi tie la infanhejmo de Cseppekó strato — kvankam la konstantaj loĝantoj aliloke somerumas — ĝoje bruegas: sur la sunbrilaj vojoj, sur la herbo, sub la multkoloraj tegsirmiloj kuradas verdkravataj infanoj.

Enirante la ĉambregon kanto kaj danco nin akceptas: hungara infana danco grupo instruas al la kongresanoj hungarajn dancojn. Poste kelkaj danco-grupanoj ricevas verdajn kravattukojn

por memoraĵo. Sed la danco daŭradas: la kongresanoj formas grandegan danceron, kaj kantas:

*De la maro ĝis la monto
Eĥu tra la spaco,
Krio de l' infana fronto:
Vivu la mondpaco!*

(J. Baghy)

Poste ĉiuj haltas antaŭ la scenejo kaj ekestas silento. La pupteatra grupo de bulgaraj pioniroj el Sofio prezentas la dramon: „La multkolorovostaj leporetoj.” Ankaŭ la ĉeestantaj plenkreskuloj ĝoje akceptas la naivan, sed arte prezentitan teatraĵeton.

Sekvas la vespermanĝo. Sed la infanoj malfruegas. En la ĉambroj ĉiu ekscite pretiĝas al la maskobalo, lasta programpunkto de la programriĉa semajno. Finfine aperas kelkaj strangaj figuroj, volvitaj en littukojn, kun mantukoj sur la kapoj, kun pentritaj barboj kaj lipharoj. Poste sovaĝe kuregas, rekte al la manĝejo tri nekona-

taj, ruĝvizaĝaj knabinoj, kun verdaj kaptukoj ... Ili ja estas maskitaj knaboj! La dekjara Darinka Petrova, bele kantanta bulgarino, alvenas en nacia kostumo. Pli malfrue aperas ankaŭ la okjara japana Majo en blanka kimono, kiel mirinda papilieto.

La dekjara Vaclav Vitek el Melnik, el Ĉeĥoslovakujo — ankaŭ barbon kaj lipharojn havanta por la maskobalo — konstatas, ke la kongreseto estis tre bona, precipe la promenado en la arbaro, kie ili „esploris postsignojn”. Vere estis malfacile trovi la vojon signitan per sekretaj signoj, kaj plenumi la taskojn, ricevitaĵajn dumvoje. (Danci, respondi al demandoj ktp.) Onklo Filipino Buttinger — el Anglujo, organizis tian konkursan ludon.

Aliaj anoj rakontis pri la memorinda „Hungara Vesperto”. La prezentado de la fama „Ciganida orkestro” kaj ĝia infana popola danco grupo entuziasmigis ĉiujn. La orkestro muzikis kaj la danco grupo dancis bonege, la kongresetanoj ege aplaudis kaj kriadis. Ĉefe la nederlanda Jan Huekstra havis egan voĉon. Pro tio la artistoj ofte ripetis.

Memorinda estis ankaŭ la pupteatro de onjo Zsóka, kies pupetojn la kongresanoj ricevis donace. La grupo de la malgranda hungara vilaĝo Szirmabesenyő, kvankam la geknaboj estis nur komencantoj en la lingvo, diligente lernis kaj sukcese prezentadis ne nur poemojn kaj kantojn, sed ankaŭ fablajn scenetojn, i. a. pri la grilo kaj formiko (de Magda Donászy) kaj pri la „interkonsiliĝo de la birdoj (de L. Kökény).

Ĉu iu povus diri, kiu programo estis la plej interesa? Ĉu la vizito en la bestĝardeno? Ĉu la veturo per la pionirvagonaro? Ĉu la sorĉisto? Ĉu io alia?

Do la 10a Infana Kongreseto en Budapeŝt bonege sukcesis, kaj tio estas la opinio kaj de la infanoj kaj de la plenkreskuloj. Kial? Certe, la bela kaj konvena ĉirkaŭaĵo multe helpis. Sed ĝi sukcesis ĉefe pro la zorgema kaj entuziasma internacia kunlaboro de tiuj esperantistoj, kiuj organizis



La ekspozicio. Ĉe la tablo Eta Szász, la gvidantino de la Infana Kongreseto, apud ŝi Ágnes Lukács, kiu faris la dekoraĵojn kaj Onklo Franjo el Jugoslavio

ĝin, kiuj antaŭ kaj dum la kongreso kunlaboris. Eĉ onjo Eta Szász, la gvidantino de la Kongreseto ne scias, kiun pli laŭdi el inter ŝiaj eksterlandaj helpantoj. (Troviĝas inter ili kelkaj, kiuj nur nun ekkonis kaj — ekamis la Esperanto-movadon.)

El la helpantoj mi mencias ĉi tie nur la eksterlandajn „onjojn” kaj „onklojn”. La onjo Radka el Bulgario, onjo Evica el Jugoslavujo, onklo Filipo el Anglujo kaj oĝjo Franjo el Jugoslavujo faris ĉion eblan por la sukceso de tiu ĉi bela semajno. Same laboris la du hungaraj *etaj* helpantoj: Katóka Fetés kaj Ludoviko Jakab ... kaj ankaŭ multaj aliaj.

La 88 infanoj el 15 landoj kaj 3 kontinentoj estas kontentaj, riĉigitaj per valoraj travivaĵoj, el kiuj plej grava estas la interkonatiĝo kaj amikiĝo kun alilandaj kunuloj — per helpo de la internacia lingvo.

Ágnes LUKÁCS



„Montevideo”

Magda DONÁSZY

LA GRILO KAJ LA FORMIKO

Grilo: Ĉir, ĉir, ĉir, karul' Formiko.
Formiko: Ĉu vizitas min amiko?
Grilo: Jes, mi. Kanta Gril' la nomo.
 Kiel varma via domo!
Formiko: Kara Grilo, do saluton.
 Sed demetu la surtuton.
Grilo: Hu, la vento blovis min tro.
 Neĝas, frostas. Venis vintro.
Formiko: Kiel ajn la frostoj akras,
 ĉe mi bona fajro flagras
Grilo: Kiom da hejtaĵo tie!
 Ĉu vi gajnis loterie?
Formiko: Mi laboron ne neglektis,
 dum somero mi kolektis
 tigon, spliton, kruston, pajlon,
 penis per surdorsa porto,
 ke mi povu meti fajron
 kaj min savi de frostmorto.
Grilo: Ho, kaj kio en angulo
 estas tio, vi, ŝparulo?
Formiko: Herbo, frukto, ŝelo, greno,
 ĉio bona por festeno,
 muelite kaj pistite.
 Nun mi manĝos apetite,
 kapdoloron mi ne konos,
 aspirinon ne bezonos.
Grilo: Trezorejo ĉi kamero!
 Al mi mankas eĉ panero.
Formiko: Vintron la prudent' avizis.
 Ĉu vi do vin ne provizis?
Grilo: Ne. Mi havas grandan peton.
 Volu doni nun prunteton,
 ĉar se mi ĝin ne ricevos,
 de malsat' mi morti devos.
Formiko: Kompatinda kamarado,
 do malplenas via plado?
 Sed ni havis ja someron,
 kial do vi la kameron
 ne plenigis antaŭvide?
 Ĉu vi kuŝis malsanlite?
Grilo: Mi nur ĉirpis, ĉirpis kante,
 pri kolekto ne zorgante.
 Mia zorgo la muziko
 estis, ne la pajl' aŭ spiko.

Formiko: Sciis vi, ke venos vintro,
 tamen vi senzorge trilis?
 Nun murmuris via ventro.
 Ĉirpo vin ne tre utilis.
Grilo: El ĉi multe da manĝaĵo
 donu iom da furaĝo.
Formiko: Nur konsilon mi donacos,
 eble tio vin kuracos:
 Se muzikis vi somere,
 dancu nun, ĉi-maniere
 vin varmigu frostvetere.

Tradukita el la hungara.

La poemfablon prezentis gelernantoj de la unuagrada lernejo de la vilaĝo Szirmabesenyő en la Infana Kongreseto, Virina Konferenco ktp.



DANTE EN LA HUNGARA ARTO

Dia Komedio vere estis epokfaranta, pli ĝuste epok-respegulanta verko, kiu fidele redonis la italan socion dum la vesperiĝo de la mezepoko. Tiatempe la komuna vivo en Firenzo kaj Venecio jam industriiĝis; apud la ĉiam militantaj princoj aperis la novaj potenculoj; nababoj de la komerca vivo: drapfabrikistoj, ŝipfaristoj kaj bankistoj. La mezepokan, puritane dogmatisman eklezion trablovigis la vento de pli libera mondkoncepto. La papa kortego fariĝis pli artema, vivoĝuema kaj pli leĝera, pli korupta.

Ĉi tiu bolanta spirita transformiĝo speguliĝas en ĉiuj tercinoj de la Dia Komedio, miksiĝante kun nesuperebla imagopovo.

La bildoj, imagitaj kaj prikskribitaj de Dante, ĉiam forte inspiris la ilustristojn de ĉiuj epokoj kaj nacioj.

En la hungara arthistorio jam en la 15-a jarcento kreiĝis kodekso, kiu estis en la biblioteko de

reĝo *Matiaso* (1440—1490), kaj entenis la Dia Komedio-n kun samepokaj ilustraĵoj. La kodekso en la jubilea jaro, 1965 estis reeldonita en faksimilo.

En 1965 pretiĝis en Hungario Dante filmo, temanta la influon de Dante al la hungara literaturo kaj arto. Ĝi detale konatigis ankaŭ ĉi tiun kodekson kaj ĝiajn ilustraĵojn.

En la 19-a jarcento el la hungaraj pentristoj desegnis ilustraĵojn al Dante Károly *Markó*, Mór *Than* kaj Sándor *Ipoly*. En la kuranta jarcento precipe du artistoj montris elstarajn rezultojn:

Dezsó *Fáy* provis la temon alproksimiĝi per relative moderna, lignogravura metodo. Sur la bildoj li figuras simultane plurajn, diversajn scenojn per ornamentema, neoklasicista stilo, imitante la manierojn de la itala stilo dum la intermilita epoko. En 1933 *Literatura Mondo* eldonis la *Inferon* Esperantlingve, laŭ la traduko de K. Kalocsay kaj tiu

volumo enhavis la ilustraĵojn de Dezsó *Fáy*.

Post kelkaj jaroj pretiĝis la ilustraĵoj de Ferenc *Lajos*. Tiuj signifis la plej intensan, individualan Dante-kontemplon: returniĝon al la antikva Dante-spirito, sed miksitane kun iaspeca orienta fantazioričo. Liaj plumdesegnaĵoj estas kiel revivitaj inkubsonĝoj. La bildoj estas samtempe klasikaj kaj modernaj, orientaj kaj okcidentaj, realemaj kaj fantaziaj kaj ĉiuj ĉi kontrastoj kunfandiĝas al kompakta harmonio, al animoskuaj travivaĵoj.

Sándor Szathmári

*

Noto de la Red. Kom. En Hungara Vivoĝis nun aperis: "Dante", poemo de János Arany, trad. de L. Tárkony (1963/1), "Plena Verkaro de Dante" de L. T. (1963/1), "Dante en Hungarlando" de L. Kökény (1965/1). Ni ĝojas, ke nun la kvaran fojon ni prezentas al niaj legantoj tiun gigantulon de la mondliteraturo. Ni esperas, ke ne pasos longa tempo, kaj aperos la dua eldono de "La Infero", tradukajo de nia Kalocsay, ĉefverko ankaŭ de la E-literaturo, kune kun la ilustraĵoj de nia artisto Ferenc Lajos.


János ARANY

EN SENFRUKTA HORO

*Mi rigardas al la nokta sombro,
dormas Tero en la propra ombro.
Jen kaj jen falantaj steloj sagas,
miaj pensoj same venas, vagas.*

*Ĉiu penso, sapvezik' bobela,
brilas kiel supre la ĉiela.
Voj' de ambaŭ ja rompiĝi devas:
antaŭ celatingo ili kreas.*

Tradukis: Lajos TÁRKONY



Ferenc LAJOS: La pordego de la infero



István Kamjén

Unu minuto

De tempo al tempo kaptas min la sopiro, verdire ĝi ekposedas min, por ŝiriĝi el la brulego de la grandurbo kaj iri ien, kie estas silento kaj trankvilo.

Mi iras supren sur la ŝtuparo ĉe la Gellért-statuo, por momento ekhaltadas ĉe la ripozejoj kaj admiras la pejzaĝon, Danubon sube fluantan, super ĝi la pontojn, kiuj svelte transarkas ĝin...

Mi jam atingis la promenejon de la Citadelo kaj de tie mi rigardas, plezuras ĉe la pejzaĝo, enspiras la puran aeron. La herboj, arbustoj, floroj verŝas el si la odoron, kiel giganta fabriko, kiu produktas nur odoron, por ke la homoj ĝuu ĝin kaj narkotigu sin per ĝi.

Ĉi tie kaj tie homoj sidas kaj admiras la urbon en fumon kovriĝintan, kiu iom mallume disvolviĝas sub la blua ĉielo.

Mi eksidas sur benkon. Baldaŭ blankharulino okupas lokon apud mi. Dum iom da tempo ŝi admiras la malnovajn ŝtonojn de la Citadelo, poste malrapide ŝi malfermas sian plastsaketon, elprenas manlaboraĵon kaj komencas kroĉeti.

Gajaj infanoj marŝas antaŭ ni, laŭte ili kantas, tiel ke eĉas la regiono. Blankmantela sekstatura virino de tempo al tempo haltas kaj rapidigas la forrestintojn antaŭen al la aliaj.

La manoj de la virino ekhaltas kaj ŝi rigardas, rigardas longe la malproksimiĝantajn infanojn. Aeroplano flugas super ni kun akra muĝado, tiel, ke la benko ektemas. Mi sentas, ke la virino ektemetas kaj poste profunde ĝemas.

— Ĉu vi ne timas? — mi demandis. Ŝi rigardas je mi per siaj grandaj, grizaj okuloj, denove profunde ŝi ĝemas:

— Sed jes...

— Nur malofte ili flugas ĉi tie.

— Mi ne ŝatas ilin. Ĉiam ili vekas la pasinton en mi.

— Ĉu la pasinton?

— Jes...

— Ĉu vi havas malbonajn rememorojn?

— Bedaŭrinde, jes.

Instinkte ni tiriĝis pli proksimen unu al la alia. Mi pensis, ke ŝi farbigas sian hararon — kiel estas kutime nuntempe —, sed tio harmoniis kun ŝia vizaĝo, kvankam ŝi jam ne estis juna. Mi eĉ ne povis imagi, kiel aĝa ŝi estas, ja sufiĉe bone ŝi tenis sin. Mi provis demandi, kio estas tiu malbona rememoro, kiun ŝi tiel ĝeme menciis.

Ŝi rigardis al mi kaj komencis:

— Kvankam mi ne ŝatas okupiĝi pri ĝi, prefere mi provas forgesi, sed kiel ajn mi volas, mi ne kapablas, ĉar denove kaj denove relumas la tago en mi, kiam ni iris malsupren en la kelon, ĉar supre jam estis neeltenebla. Jam ankaŭ niaj nervoj preskaŭ malfunkciigis... Mia edzo — kiu estis inĝeniero — konvinkis min: nun jam ni devas iri malsupren. Mi havis filinon 18-jaran, kun grandaj bluaj okuloj, kun belege onda hararo, ŝi estis antaŭ la abiturienta ekzameno.

— Ni pasigis jam tri semajnojn en la kelo, ĉion ni konsumis jam, eĉ la fabo havis oran valoron. De tempo al tempo la bruo ĉesis, la homoj kuraĝis elveni, kaj tranĉis pecon el la ĉevalo falinta sur la strato, el kiu fariĝis la festotaga manĝaĵo. Jes... festotaga, ĉar tiam ĝi tion valoris. Multope ni amasiĝis en la ŝirmejo, unu apud la alia. Ankaŭ akvon ni havis nur malofte, por la sinlavado, sed fiodoro... estis tiom pli abunde.

— Mia edzo estis silentema homo, neniam li partoprenis en la konversacioj. Vi scias, kiel estis tiam, la opinioj estis diversaj. Iu pri tia, kelkaj pri alia okazaĵo havis esperon, estis tiaj, kiuj eĉ laŭte publikigis ĝin, kaj estis, kiuj silentis. Sed estis inter ni senpovaj malsanuloj, maljunuloj, kio malbone efikis al ni. Mia filino ĉiam tiriĝis al mi: „Kara panjo, nur foje finiĝu tiu ĉi teruraĵo! Neniam mi estos malkontenta!” Kvankam ŝi ne estis malkontenta. Nuntempe oni diras: kie estas nur unu infano, tie estas malfacilaĵo, ĉar la sola infano estas postulema, iom eĉ impertinenta. Mia filino estis nek impertinenta, nek postulema. Ŝi vivis nur por la lernado. Same ŝi amis nin ambaŭ, ŝi preferis nek sian patron, nek sian patrinon. Estas vere, ke el inter ni neniu klopodis ŝin tiri nur al si. — Ŝi iradis por instrui siajn pli malfortajn samlernejanojn, ŝi kolektis la ricevitan monon kaj jen al mi, jen al sia patro ŝi afablis per ia donaco. Kvankam ŝi ne petis, regule ŝi ricevis poŝmonon. Ofte ankaŭ ĝin ŝi ŝparis. Ŝi havis ĉion, ĉiun ŝian deziron ni plenumis. Bele ŝi fortepianludis kaj mi fiere aŭskultis ŝin.

— Nu, sed mi ne volas rakonti ŝian tutan infanaĝon aŭ la vivon de ni ambaŭ. Mi estas gimnazia pedagogo. Ankaŭ miajn instruojn mi edukas tiel, ke ili fariĝu simplaj, solidaj homoj. Ili ne estu egoistaj, konsciuj, ke ili vivas en granda komuno.

— Iun nebulan decembran tagon mi ekmemoris en la ŝirmejo, ke ie en la manĝakamero, malantaŭ la boteloj mi havas iom da fabo. Mi decidis supreniri. Estis silento, ankaŭ malsupre ĉio silentis, kaj tiam mi decidis, ke mi kuiras el la faboj bonan manĝaĵon. Mia edzo kaj filino petis min: ne iru, sed mi vidis, ke ili suferas pro la malsato, kaj tion mi ne plu povis elteni. Mi iris supren, kvankam mia kara filino kroĉis sin al mi: „Ne, mia panjo, vi iru nenien. Vi vidas, ke neniu movas sin.” Sed mi zorgis pri nenio, dirinte, ke baldaŭ mi estos denove ĉi tie.

— Malfacile, sed tamen mi trovis la fabojn, kiujn mi ne selektinte, nelavite komencis kuiru. Neniam mi sentis tiel mirindan odoron, kiel tiam. La strato estis trankvila. Mi do ne timis. Mi okupiĝis en la kuirejo, trairis la ĉambrojn, ĉu estas ĉio sur sia loko, ĉu ne estis iu fremdulo en la loĝejo? Mi rimarkis nenion. Subite suprenkuris mia filineto. Mi riproĉis ŝin: — Tuj reiru, baldaŭ estos preta la legomo. — Malfacile mi povis resendi ŝin, ankoraŭ el la pordo de la kelo ŝi rekriadis: — Ne restu longe, panjo, ĉar tiam ni ambaŭ supreniros.

— Ne, ne, mi respondis, kiam ĝi estos preta, tuj mi iros. — Iom mi purigis, aranĝis en la loĝejo, ĉio estis kovrita per fulgo, polvo, kaj mi, kiu ŝatis la purecon, la ordon, ne povis tion rigardi.

— Iom poste mia edzo kriadis al mi: lasu tiun aĉan fabon, kaj venu jam malsupren. — La faboj ne kuirigis ankoraŭ, kelkaj pecoj krakis, sed ĉar mia edzo denove maltrankviladis, post duonhoru mi kunpakis manĝilaron, ankaŭ pecon da pano, por ke mi malsupreniru. La ŝirmejo estis ĝuste sub ni. Mi iris malsupren sur la ŝtuparo, mi jam atingis la teretaĝon, mi estis preskaŭ ĉe la pordo de la



kelo, kiam aŭdiĝis terura eksplodo, poste bruego, polvo. Por momento miaj piedoj paralizigis, verdire mi sufokiĝadis, mia buŝo kaj okuloj pleniĝis de polvo. Tra la ruboj mi trenis min al la pordo de la kelo kaj kriadis:

— Géza ... Géza ... Mia Evo ... Eveto ... Preskaŭ kvarpiede mi atingis la kelon. Malsupre, ĉe la ŝtupo kuŝis sterne mia filineto. Nigra ŝi estis pro fulgo kaj polvo. Mi ne scias, kiel mi forĵetis la poton, mi nur tiregis la mal-feliĉan, tra la ruboj. Ĉe la ĉefŝtuparejo mi demetis ŝin, kaj komencis surstrate kriadi. Venis ja kelkaj homoj, ili faris portilon el latoj kaj lignotabuloj kaj ni portis ŝin en la klinikon. Survoje ofte ni tiriĝis malantaŭ la pordegojn, ĉar oni pafadis. Mi ne scias kiom da tempo pasis, ĝis ni atingis la klinikon. Iuloke ne estis akvo, aliloke ne estis elektro, fine ni povis ŝin lokigi. La kelo de la hospitalo estis plena de vunditoj, malsanuloj, sed tiom mi petegis, ke oni komencis la operacion ĉe kandellumo. Sed oni ne povis fini, ĉar tuj post la komenco, denove venis la maŝinoj. Tie ŝi mortis.

— Mi rapidegis reen, sed nia ŝirmejo plentrafiĝis, jam de la strato mi vidis, ke tie estas fantoma malpleno. Tiam mi konsterniĝis: ankaŭ mia edzo mortis. Tamen ĉion mi traserĉadis. Jam estis sangmakulaj miaj fingroj, miaj ungoj rompiĝis. Mi trovis nenion. Mian saketon neniam mi forlasis, en ĝi estis ja niaj valoraĵoj. Mi kuregis al la Enteriga Entrepreno por aĉeti ĉerkon. Eĉ tion mi jam ne scias, kiom mi pagis por ĝi. Mi nur erarvagadis en la urbo. Se estis silento, denove kaj denove mi iris kaj serĉis mian edzon. Tiam blankiĝis mia hararo.

— Alitage, kiam mi reiris al la kliniko, oni sciigis al mi, ke mian filineton oni jam enterigis en la Botanika Ĝardeno, en komunan tombon. Eĉ pensadi mi ne povis.

— Kiam finiĝis la bataloj, en la ĉirkaŭaĵo oni elfosis la tombojn. Ĉie mi serĉis ilin. Tiun ĉerkon, kiun por mia filineto mi elpagis, mi rekonis; kiam oni malfermis ĝin, mi ektimiĝis: nekonata viro kuŝis en ĝi.

— Nun sola mi estas, dum unu minuto mi perdis ĉion. Mi perdis ĉiujn, kiujn mi amis, kun kiuj mi estis unu, kaj ankaŭ ili estis unu kun mi. Ĉu nun jam vi komprenas, kial mi ektremas, se maŝino flugas super mi? Ĝi vekas la teruron en mi. Tiun teruran minuton, kiam mi trovis nur erojn el miaj mebloj, kaj ĉifonetojn el la vestaĵoj de miaj

amataj. Pro tio mi abomenas la kruelecon, kiu puŝis min en la solecon. Mi ŝatus ŝiri el la koro, animo de la homoj la malbonon, venĝon, malamon, koleron, envion, mon-avidon, ĉion, kio estas malbona, kio povas amarigi la animon de la homo, kaj ŝatus planti en ilin amon, interkomprenon, pacon, diligenton. Diligenton, kiu de post la pratempoj ĉiam suprenlevas la homon. Ĝi plenigas lian koron kaj animon per kredo, espero, por ke regu nur la bono, kaj pereu la malbono de sur la tero.

— Nun mi loĝas kune kun mia fratino, ni komprenas bone unu la alian, sed miaj amataj ... ili ne plu estas. Mi ŝatus krei en la mondon, por ke ĉiu aŭdu sur la tero: Homoj! Neniam plu!

— Pardonu al mi, ke mi ĉion ĉi rakontis.

Ne plu ŝi parolis, silente ŝi daŭrigis la kroĉetadon.

Belvestita, alta, blonda knabino paŝadis antaŭ la benko, kun libro en sia mano. Laŭte ŝi diris la tekston de la libro, estis evidente, ke ŝi lernis. La maljunulino levis al ŝi sian rigardon kaj kiam la knabino malproksimiĝis, prenis sian poŝtukon kaj viŝis la okulojn.


El la hungara: Sándor SZALAY

Postskribo de la verkisto. Mi estas filo de multmembra malriĉa kamparana familio. La cirkonstancoj devigis miajn gepatrojn, por sendi min labori tre frue, en mia sesjara aĝo.

— Mi estis gardisto de anseroj kaj porkoj, bienservisto, perioda laboristo en grandbieno, laboristo en brikfabriko, mi laboris ĉe domkonstruadoj, poste mi estis grundlaboristo. — Tiun ĉi lastan mi daŭrigis ĝis la liberiĝo (1945), ĉar tiu ĉi laboro taŭgis pleje al mia maltrankvila naturo. Tio donis eblon por mi travojaĝi la tutan landon. Dum mia migrado mi vidis tiun pezan luktadon, kiun mia popolo faris por la ĉiutaga pano. Tiuj ĉi travivaĵoj inspiris min, por ĉion ĉi priskribi. Tiel mi fariĝis verkisto. — Ĝis nun aperis de mi du romanoj, unu romaneto kaj pli ol cent rakontoj. Mia romano „Mihaelo” ricevis la literaturan premion „József Attila”. — Per miaj skribaĵoj mi intencas atentigi ĉiun pri tio, kion signifas por ni la paco kaj la libereco. — De post tri jaroj mi estas blinda.

Emil SIMON:

La ondoj



La baptopatro permesis al li forveturi per la motorboato. Li konis la knabon serioza, kaj fidis al li. Post kiam li donis sufiĉan instruon pri kio oni devas atenti, ridetante li demandis:

— Ĉu ankaŭ pasaĝeron vi havos?

La knabo ruĝiĝis.

— Nu, bone! — ridis la baptopatro frapante lian ŝultron. — Sed tre atentu!

La knabo ekiris el la malsupra haveno funkciigante la motoron per la plej malgranda rapido. Li veturis proksime al la bordo kaj bele, rekte li volis pasi, sed li deziris ankaŭ tion, ke la sinbanantoj rimarku lin.

La knabinon li renkontis ĉe la rando de la kanejo. Ŝi enbotiĝis rekte el la akvo kaj sidigis. Poste ŝi ŝanĝis la lokon. La knabo longe rigardis la akvomakulojn sur ŝia korpo.

La knabino ekridetis.

— Vere afable estas de vi, ke vi alvenis per la boato.

— Nenio! — diris mallerte la knabo.

Li akcelis la rotacion de la motoro, sed zorge kaj atente li gvidis la boaton. Tiom forte li tenis la direktilon, ke lia pugno paliĝis pro fortostreĉo.

La knabino kuŝiĝis sur la antaŭo de la boato. Ŝi estis du jarojn pli aĝa ol

la knabo. Virino plenkreska. Ili konatiĝis antaŭ unu semajno. Ankaŭ tiam la knabo krosis kun la motorboato kaj la knabino mansvingis el la akvo.

— Ĉu vi kunportus min? — foje ŝi kriis.

Sia etendiĝinta brako tiel leviĝis super la akvo, kiel la arksimila movo de la plej belaj arboj.

La knabo provis aldirekti la boaton, sed preskaŭ kondukis ĝin en malbonan direkton. Fine li tamen sukcesis halti proksime ĉe la knabino.

— Jen! — li diris kun nesperta ĝentileco.

La knabino ekkuris kirlante ondojn en la akvo, kaj per lerta movo elakviginte saltis en la boaton. La knabo gape sin rigardis.

— Nu, vi povas ekiri! — ridis la knabino. Ŝiaj sanaj dentoj blanke brilis, kiel la ŝtoninkrustita bordorando en la sunbrilo.

La knabo kluĉis kaj ili lante krozis sur la akvo. Intertempe ekblovis la vento kaj ŝovadis flanke la boaton.

— Ĉu vi ne timas? — demandis la knabo.

— Mi ne estas timema! — diris la knabino.

Tiel estis la unuan posttagmezon, kaj de tiam preskaŭ ĉiutage ili kune boatis. La knabino kutimiĝis al la silentemo de la knabo, sed la knabo revadis pri herojaj agoj; ne unufoje li imagis sin vivosavanto de la knabino. Kelkfoje venis en lian kapon la penso pri la hejmeniro, kaj li pensis ankaŭ pri tio, ke iun posttagmezon la knabino definitive elboatiĝos, kaj vados al la bordo postlasante nur la glatiĝantan akvospegulon.

La knabino rimarkis, ke li meditas, kaj demandis:

— Ĉu mondsavajn pensojn vi havas?

La knabo embarasiĝis, kaj ankaŭ iom koleriĝis. Li atendis, ke la knabino kompatos kaj ekamos lin. Li memoris pri similaj scenoj en la filmoj.

— Ne! — li diris kun obstino. Intence li evitis la rigardon de la knabino. Li aŭskultis la monotonan zumadon de la motoro, kaj tiel tenis la direktilon, ke lia tuta korpo skuiĝis laŭ takto de la motoro.

Neatendite konfuza bruo interrompis la takton, la motoro komencis astme sufokiĝi, poste ĝi haltis. Subite ĉirkaŭprenis ilin la silento kaj ili ekaŭdis la rumoron de la sinbanantoj.

La knabino leviĝis kaj turnis sin malantaŭen.

— Kio okazis?

— Mi ne scias — respondis la knabo. Li etendis la brakon kaj montris al la motoro. — Ĝi haltis.


— Ja tion mi aŭdas! — diris la knabino. — Faru ion al ĝi!



— Ni havas remilon — diris mallaŭte la knabo. — Ankaŭ per ĝi ni povas atingi la bordon.

— Ĉu tion vi ne hontus? — moke demandis la knabino.

La knabo mallevis la kapon. Poste, depreninte la kovrilon, li rigardis la motoron. Li sentis, ke nun alvenis tiu okazo, kiam li povus iĝi respektinda antaŭ la knabino. Kiomfoje li povus ja



ripeti dum la konversacioj: „Ĉu vi memoras, kiam mi riparis la motoron?“. Kaj ŝiaj okuloj ekbrilus pro la fiero, ke li komprenas ankaŭ al tio.

Sed la realo estis alia. Ne havante konojn pri la motoro, ĝi estis sekreto por li, kvazaŭ libro por homo, kiu — ne sciante legi — malfermis ĝin.

— Ĉu ĝi ne funkcias? — la knabino demandis post iom da tempo.

— Mi trovas ankoraŭ nenion — diris la knabo. Ambaŭ liaj manoj estis nigre oleaj, kaj li bone sciis, ke li nur malpurigas sin, sed ne prosperos. El mezo de la akvo la vento rulis fortajn ondojn, kiuj komencis ŝetadi la boaton. La koro de la knabo pulsus multe pli

forte ol kutime, kvazaŭ la ondado cirkulus en liaj vejnoj.

Ili estis longe silentaj. Poste ili ekaŭdis proksimiĝantan zumadon de motorboato. La ŝipo ĉirkaŭnaĝis ilin, poste ĝi venis tute proksime. En ĝi sidis viro, proksimume tridek kvin jarojn aĝa, kies bruna korpo, ŝmirita per oleo, brilis kiel la marmorstatuoj. Post konfidenca kapmovo al la knabino, li rigardis al la knabo.

— Bubo, ĉu io malbonas?

La knabo subite sin levis. Tia alparolo en ĉeesto de la knabino tuŝis lin, kvazaŭ la viro estus lin vangofrapinta. Li ruĝiĝis, lia kapo ekfajris, liaj manoj pugniĝis. Tion rimarkis la knabino, forturnis sin kaj ekridetis.

La viro, zorgante pri nenio transpaŝis en ilian boaton, kaj la ŝnuron de siaj propra ŝipo alkroĉis al la remilhoko. Kliniĝinte super la motoro, post ioma tempo li ekparolis:

— Bedaŭrinde, oni devas ŝanĝi la elektran eksplodigilon. Ĉu vi havas remilon?

— Mi havas — respondis mallaŭte la knabo. Kriegi li preferus kaj vangofrapi la viron, sed duopo staris super li, kaj li perdis ĉiun kuraĝon.

— Ne estas malproksime la bordo! — konsole diris la viro kaj, rerampinte

en sian propran boaton, li kluĉis la motoron. Tiam la knabino leviĝis.

— Ĉu vi kunportus min? — ŝi kriis al la viro. Ambaŭ siajn brakojn ŝi altenlevis, kiel la statuoj simbolantaj triumfon.

— Venu! — respondis la viro kaj ridis. Kiam la knabino transiĝis, la viro ankoraŭ atentigis la knabon:

— Malrapide remu, por ke vi ne laciĝu!

Kaj ili forbruis. Post ilia malapero la fendita akvospegulo kuntiriĝis kaj viglaj ondoj ekruliĝis kvazaŭ konfuzaj pensoj.

El la hungara: Sándor POLACSEK


Ĉu Vi aŭskultas la Esperantodissendojn de Radio Budapest?

Per la meza ondolongo 240-metra kaj per la mallongaj ondoj 42,2, 48,1 kaj 50,8 metraj. Nepre

skribu pri Viaj spertoj kaj proponoj al Radio Budapest, VIII. Bródy Sándor utca 5-7. Ĉiutage de la 20a horoj kaj 30 minutoj dum kvaronhoro interesa programo en Esperanto!

VERE DISTRA TELEVIDA APARATO

Desegno de György Fülöp



PATRA KONSILO

Desegno de Balázs Balázs-Piri



Neniam edziĝu, fileto mia!


INVERSA MONDO

Desegno de Lajos Schwott



MELANKOLIO

Desegno de Balázs Balázs-Piri



Kiel sola mi estas!

VIRA SORTO

Desegno de István Endródi



Se vi scius, kiom min turmentas mia edzino per sia senmotiva ĵaluzado.

Abono de HUNGARA VIVO en eksterlando

Peranto al eksterlando: *KULTURA Budapest, 62, P. O. Box 149.* — Sumoj de abonprezo por unu jaro, en pluraj ĉefaj valutoj: Usonaj dolaroj = 1,50; Kanadaj dolaroj = 1,50; sterlingaj funtoj = 0-11-0; okc. germanaj markoj = 6,40; svedaj kronoj = 7,80; norvegaj kronoj = 10,70; danaj kronoj = 10,40; italaj liroj = 940,-; belgaj frankoj = 75,-; svisaj frankoj = 6,60; francaj frankoj = 7,50; nederlandaj guldenoj = 5,50.

Perantaj firmoj en la diversaj landoj:

ĈEĤOSLOVAKIO:
Novinartsvi ORBIS n. p.
PRAHA 12.
Stalinova 46.
Novinartsvi ORBIS n. p.
BRATISLAVA
Leningradska 14.

Joseph Brownfield
NEW-YORK 38.
15. Park Row.

Agence Littéraire et Artistique
Parisienne
PARIS
7 Rue Debelleyme

SVEDUJO:
Nordiska Bookhandeln
STOCKHOLM
Drottninggatan 7-9.

BULGARUJO:
Direction R. E. P.
SOFIA

FINNLANDO:
Akateeminen Kirjakauppa
HELSINKI
Keskuskatu 2.

SVISLANDO:
Azed A. G.
BASEL
2 Postfach

KANADO:
2 Spadina Road
TORONTO 4, Ont.

DANLANDO:
Ejnar Munksgard
COPPENHAGEN
Norregade 6.

PORTUGALUJO:
Libraire Buchholz
Av. Deliberdade 50
LISBOA

JAPANUJO:
Nauka Ltd.
TOKYO
2, Kanda Zinbocho Chome

BRAZILO:
Livrarya Bródy Ltda
SAO PAULO
Caixa Postal 6366

ITALUJO:
Libraria Commisionaria San-
soni
FIRENZE

ISRAELO:
Haiflepac,
HAIFA
P. O. B. 1794.

AŬSTRUJO:
Vertrieb Aüsländischer
Zeitungen
WIEN
Höchstädtplatz 3.

GERMANUJO:
W. E. Saarbach
KÖLN 1.
Gertrudenstr. 30.

Hadash
TEL-AVIV
P. O. B. 26049

BELGUJO:
„Du Monde Entier”
BRUXELLES
5 Place St. Jean

Kunst Wissen
Erich Bieber
STUTTGART
Wilhelmstr. 4.

RUMANUJO:
OSEP
Gara de Nord.
BUKAREST.

AŬSTRALIO:
A. Keesing
SYDNEY
G. P. O. Box 4886

Kubon und Sagner
MÜNCHEN 34.
Schliessfach 68.

ĈINUJO:
Waiwen Shudian
P. O. B. 50.
PEKING

ANGLUJO:
The Danubia Book Company
B. I. Iványi
LONDON W. 1.

ALBANUJO:
Yyra e Spedicionit
Te Shtypit Te Jashtem
TIRANA.

VIETNAMIO:
Phong Phat Hanh Bao Chi 17.
Dinh Le
HANOI

78, Shaftesbury Avenue
Collet's Holdings Ltd.
Denington Estate
WELLINGBOROUGH
Northants

POLLANDO:
B. K. W. Z. „RUCH”
WARSAWA.
Al. Jerozolimskie 119

NEDERLANDO:
Swetz & Zeitlinger
AMSTERDAM C
Keizersgracht 471

USONO:
Stechert Hafner Inc,
NEW-YORK 3. N. Y.
31. East 10 th. Street

FRANCUJO:
Societe Balaton
PARIS
12, Rue de Grange Batelière

KOREO:
„Chul Bo”
PHENJAN

Hungaroj abonu por eksterlandanoj laŭ la avizo sur la 2-a kovrilpaĝo



La Madách Teatro (Budapešto)



La Operdomo (Budapešto)